

V-13119/1981

OFICIALA ORGANO DE OOMOTO KAJ U. H. A.

# Oomoto

jan.-jun.

1  
9  
8  
1



*Vidu p. 15*



*En 1925, Onisaburo Deguči, la kunfondinto de Oomoto, establis la Ĵinrui Aizenkai, aŭ Universalan Homaman Asocion (UHA), kiel la sekularan brakon de Oomoto. Artikolo III de ĝia konstitucio deklaras: "La celo de ĉi tiu Asocio estas eternigi la pacon de la mondo per forigado de la rasa, nacia kaj religia baroj, altigado de la universala amo kaj frateco de ĉiuj homoj kaj disvastigado de homfrateca kulturmedio tra la mondo."*

*Ekde tiam, la movado de UHA etendiĝis en ĉiuj direktoj, por manpremi kun multaj organizaĵoj aŭ homgrupoj, kiuj laboras por la afero de mondpaco — kun spirito de senpartieco kaj kun reciproka komprenemo kaj toleremo inter la diversaj kulturoj, rasoj, nacioj kaj religioj.*

lora Filio, oficisto de Dia Medicina Centro ;

el Srilanko : d-ro T. P. Amerasinghe, prezidanto de Srilanka Filio ; s-ro S. Tharmarajah, ĝenerala sekretario ; s-ro Hathy Sulaiman.

Gastodelegitoj, el Hindujo : s-ro V. R. Krishna Aiyer, juĝisto emerita de Hinda Plejalta Kortumo, s-ro R. Suresh, oficisto de la hinda registaro ;

el Tajlando : s-ro Suchart Kosolkitiwong, prezidanto de IFR ; Subgeneralo Prasit Cheurboon, vicprezidanto de IFR ; s-ro Sawan Sangbunlung, sekretario, IFR ; s-ro Metee Ruangutamanant, ĵurnalisto.

Aliaj gastoj estis s-ro Reinhart Ruge, internacia prezidanto de AMM, kaj s-ro Philip Isley, ĝenerala sekretario de AMM.

La delegitoj el Hindujo kaj Nepalo, kaj (poste) el Srilanko kaj Tajlando, okazigis kunsidojn kun membroj de japanaj filioj de UHA kaj preparajn diskutojn. Dum la semajno antaŭ la konferenco, ili vizitis Tokion, Kioton, Kameoka, Nara, Oosaka kaj Ajabe. Inter la ĉefaj okazaĵoj estis la unua bonveniga akcepto ĉe UHA-sidejo en Kameoka ; vespermanga akcepto en Oosaka, aranĝita de la Kioto-regionaj filioj de UHA ; privata akcepto fare de la Spirita Gvidantino de Oomoto en Ajabe. Krome, ĉiuj delegitoj partoprenis en la Granda Secubuna Festo, la plej grava ĉiujara ceremonio de Oomoto, en la Mirokuden-sanktejo, Ajabe, kaj ankaŭ tie okazis por ili bonveniga kunveno, kun partopreno de la miloj da UHA-anoj kolektiĝintaj por la Secubuna Festo.

La konferenco inaŭguriĝis la 5an de februaro, ĉe la Internacia Konferencejo en Kioto. Post malferma saluto de s-ro Ippei Saga, vicprezidanto de UHA, estis komuna preĝo por la paco. Sekvis mallongaj paroladoj de kelkaj konferencanoj, Oomoto-estrarano, eminentaj gastoj inkluzive de la guberniestro de Kioto, la prezidanto de la Komitato pri Religioj de la Mondfederista Organizo, la direktoro de la Tut-Japana Budhista Asocio, la prezidanto de la Asocio de Ŝintoaj Sanktejoj, la ĉefepiskopo de Nagasaki, kaj reprezentanto de la Konsilio de Islamaj Asocioj en Japanujo.

La unuan matenon, s-ro Jasumi Hirose, prezidanto de UHA, faris paroladon, en kiu li deklaris la esencon de la celo de UHA, montrita en la fonda deklaro de l' organizaĵo en 1925 : "Ni alte tenu la standardon de universala amo kaj frateco, kaj klopodu efektivi la pacon kaj harmonion inter la homaro, kaj fondi la mondon, en kiu la homaro povos vivi por ĉiam en feliĉo kaj kun ĝojo". Kaj li akcentis : "Hodiaŭ, kiel politike, tiel ankaŭ socie, granda ŝanĝo estas postulata. . . Estas bedaŭrinde, tamen, ke la valoroj, kiuj devus servi kiel bazo por la ŝanĝoj estas ne sufiĉe ekzamenitaj kaj pripensitaj". Ĉi tiu konferenco tial havas gravan signifon por UHA, kiu en la lastaj jaroj plivastigas siajn eksterlandajn aktivecojn, precipe en Azio, per fondado de la branĉoj, kiuj "surbaze de la principo de egaleco kaj reciprokeco disvolvas siajn memstarajn aktivecojn, respektante siajn etnajn individuecojn".



S-ro J. Hirose, prezidanto de UHA (parolanta) kaj Aziaj delegitoj

S-ro Hirose poste ekzamenis la nuntempan problemon de la homo kaj la medio el la tri vidpunktoj de “agrikulturo kaj manĝaĵo”, “homaj rajtoj kaj sociala bonstato”, kaj “religioj kaj kulturo”. En la tempo, kiam la grandaj partoj de la homaro frontas al mortmalsato, estas “urĝa bezono krei novan civilizacion bazitan sur la principo de kunekzistado kaj kunprosperado de la tuta kreitaro — anstataŭ la egocentra civilizacio disigita de la tero”. Li prezentis la problemon de monda paco ne nur el la vidpunkto de la politikaj aŭ homaj rajtoj kaj ekonomiaj vivniveloj, sed ankaŭ kaj ĉefe el la vidpunkto de la spirita kaj emocia povreco trovebla ĉe tiel multaj homoj en la evoluintaj nacioj.

Koncerne religion kaj kulturon, “evidentiĝas, ke vera civilizacio de la homaro devas esti bazita sur la pluralisma kulturo, kiu respektas la diversajn kulturajn tradiciojn de la multaj homgrupoj etnaj, rasaj kaj aliaj de la mondo. . . Por venigi pacon kaj efektiviĝi spiritan akordiĝon hodiaŭ en Azio necesas, ke oni havu grandan filozofion, sintezan religian veron, kiu reunuigos la homaron, ne forgesante ankaŭ profiti la diversecojn de Aziaj kulturoj”.

Ĉi tiu ideo de la diverseco en unueco karakterizis la paroladon de s-ro Hirose: “Nun estas la epoko de unu mondo, kaj samtempe de la regionoj, kaj urĝas, ke ni kreu tute novan kulturon konforman al nia epoko kaj al la Aizenmondo, t. e. mondo, kian celas UHA. La Konferenco de Aziaj Delegitoj klopodas trovi direkton por aktivecoj konvenaj al la respektivaj regionoj, celante la kon-



- 1) s-ro S. Kosolkitiwong el Tajlando
- 2) s-ro K. Vaitha el Hindujo
- 3) d-ro T. P. Amerasinghe el Srilanko
- 4) s-ro V. R. K. Aiyer el Hindujo
- 5) d-ro N. Rao el Hindujo
- 6) s-ro H. Sulaiman el Srilanko





La Urbestro de Kameoka akceptas Aziajn delegitojn de UHA.

struon de Aizen-mondo per pliprofundigo de reciproka kompreno kaj solidareco..."

Post la parolado de s-ro Hirose, oni faris raportojn, pri la aktivecoj de la filioj en Japanujo, Hindujo, Nepalo kaj Srilanko. Unue, en Japanujo, la landaj filioj aktive laboras por la plivastigo de la Mondfederista Movado, kolektas monon kaj vestaĵojn por helpi al la kreskanta problemo de rifuĝintoj, kaj partoprenas en la movadoj por la Internacia Jaro de la Infano kaj la Internacia Jaro de la Fizikaj Handikapitoj. Sur pli regiona nivelo, la filioj laboris super la problemo de poluciado, partoprenis en la kontraŭnuklearmilaj movadoj, disdonante la diversajn presajojn de UHA, kaj laboris por agrikulturo kaj nutrado, kaj la virinaj grupoj okupiĝis precipe en familia konsilado kaj infan-edukado.

S-ro K. Vaitha kaj D-ro N. Rao raportis pri la laboro de la Madrasa Filio. La plej granda aktiveco tie estas la Dispensario Dia Amo, kiu, fondita en 1977, donas medicinajn servojn al malriĉuloj de Madraso. Nun progresas planoj por konstrui novan akuŝejon kaj elementan lernejon sur tero disponigita de la ŝtata registaro, kaj ankaŭ domojn por loĝantoj de la malriĉaj kvartaloj. Krome, membroj de la Madrasa filio funkciigas sanitajn klinikojn en lernejoj kaj malriĉaj kvartaloj, kaj okazigas publikajn kunvenojn de UHA. La Junulara Fakto kreis Junularan Centron, kolektas monon por helpi la viktimojn de katastrofoj kaj por doni hejmon al maljunuloj, kunhelpas en la sanedukaj entreprenoj kaj fondis rond-

vizitan bibliotekon.

D-ro M. Govindaraju prezentis raporton de la Bangalora Filio. Ankaŭ ĉi tie, la UHA-anoj, inkluzive de kelke da medicinaj doktoroj, establis medicinan centron en malriĉa kvartalo kaj faras la samajn servojn kiel en Madraso. Krom la okazigo de kunvenoj por informi la publikon pri la celado de UHA, la Bangalora Filio estas tre aktiva ankaŭ en la sendado de kuracistaj grupetoj en kamparajn distriktojn, kie neniam daŭraj medicinaj servoj estas haveblaj, kaj kie la UHA-grupetoj faras sanekzamenon kaj -edukadon.

S-ro N. B. Bajracharya, s-ro M. B. Pradan, kaj s-ro M. Jujoo raportis pri la aktivecoj de UHA en la diverslokaj filioj en Nepalo, kiuj multiĝis konsiderinde. La Nepalaj membroj aktivas en la kulturaj kaj religiaj kampoj, kaj jam okazigis plurajn komunajn adorservojn kun partopreno de Hinduoj, Budhistoj kaj Oomoto-anaj pastroj. Krom la edukaj aktivecoj per prelegoj kaj kunvenoj, ili okazigas monkolektan kampanjon por savi la viktimojn de la longa senpluveco kaj tertremoj en diversaj partoj de Nepalo. Ĉiu Junulara Fakto kreskas kaj la Virina Asocio ĵus fondiĝis, kaj planoj nun progresas por la fondo de san-centro, kiu enhavos lernejon kaj aliajn socialajn faciligojn.

D-ro T. P. Amerasinghe prezentis raporton pri la Srilanka Filio, kiu estis aktiva precipe sur la internacia kampo. La srilankaj UHA-anoj kampanjas kunage kun UNO por la 'jardeko por la protekto kaj evoluo de la infano', kaj ankaŭ



Infanoj bonvenigas la delegitajn gastojn en la Mirokuden-sanktejo, Ajabe.





Aziaj delegitoj revenantaj post pilgrimo al la tombejo de la fondintoj de Oomoto

kunlaboras kun AMM por la starigo de mondpaco. En 1978 ĉi tiu filio okazigis la unuan Internacian Seminarion kun partopreno de UHA-filioj el Hindujo, kio kondukis al la forĝo de pli intima ligo inter la diverslokaj UHA-grupoj en tiu mondparto. Inter iliaj komunaj aktivecoj estas tiu de internacia okuldonata entrepreno kaj tiu de junulara interŝanĝa entrepreno. La Srilanka Filio laboras ankaŭ por la kampara medicina traktado por provizi pli bonan sanzorgon al la kamparanoj. Ĝia monata *Sri-Lanka News de ULBA* (UHA) kreskas en la eldonkvanto.


En la restanta tempo de la konferenco, la delegitoj ĝuis la frukton de la diskutoj pri la diversaj temoj prezentitaj. La frukto estis la plibona kompreno reciproka pri la respektivaj bezonoj kaj kapabloj de la filioj de UHA en Azio kaj la renovigita firma volo plenumi ilian komunan celon kune. Esprimante ĉi tion, oni faris la komunan rezolucion fine de la konferenco okazigi similan konferencon en Japanujo ĉiun trian jaron kaj ankaŭ okazigi ĉiujarajn regionajn asembleojn.

La sekvantan tagon, la 7an de februaro, okazis la Simpozio pri la Paco en Azio, kian ni celas laŭ la vidpunktoj de religio kaj kulturo. Post komuna preĝo por la paco, salutis reprezentantoj de UHA-, Budhanaj kaj Kristanaj grupoj, kaj

oni legis mesaĝon de la Japana Ministro de l' Eksterlandaj Aferoj. Poste malfermiĝis publika diskutado.

Inter la parolantoj estis prof. K. Iŭata de la Nacia Etnologia Muzeo, prof. (emerita) Koniŝi ĉe la Universitato de Tokio, s-ro K. Aiyer, d-ro T. P. Amerasinghe kaj s-roj Nagatomo kaj Arikaŭa el UHA. La temoj diskutitaj estis: la komunaj bazoj de la kulturo en Azio, la homaj rajtoj en Azio, la koncepto de solidareco kaj interdependeco inter la aziaj nacioj, Islamo en Sudorienta Azio, ktp. Post la diskutoj kaj fina resumo, la simpozio fermiĝis per denova pacpreĝo.

Adiaŭa vespermanĝo de la sama tago faris taŭgan finon al la tuta oficiala programaro de la Azia Konferenco kaj la Simpozio. La sekvantan tagon, la delegitoj kaj observantoj kune vojaĝis al Hiroŝima, kie ili vizitis la pacparkon kaj la pacmonumenton kaj trarigardis la pacmuzeon. La Hiroŝima-regionaj UHA-grupoj donis vesperan bankedon, kie la eksterlandaj kaj lokaj membroj povis interkonatiĝi kaj ŝanĝi opiniojn. La delegitoj poste dividiĝis en kvar grupojn, kaj vojaĝis al Kanazaŭa, Macue, Ŝizuoka kaj Kumamoto. En ĉiu loko la aziaj delegitoj povis renkontiĝi kun lokaj membroj, kaj kreis amikajn rilatojn sur persona bazo. Ili profitis la okazon sperti iom de la japanaj kulturo kaj vivmaniero en pli intima maniero, ol estis eble dum la konferenco mem, kaj tiel finiĝis la dusemajna sukcesa konferenco de internacia interŝanĝo. (C. R.)



Ili surskribas ritajn slipojn, por partopreni en la Secubuna Festo de Oomoto.

## Oomoto inaŭguris monumenton en Ponapo insulo amike ligita kun ni en Pacifiko

Ponapo situas 4,300 kilometrojn sudoriente de Tokio kaj 1,800 kilometrojn de Gvamo en Pacifiko. Havanta 375 kvadratajn kilometrojn en la areo, la insulo estas la plej granda post Gvamo en Mikronezio.

La vulkana, malgranda insulo havas diametron de proksimume 22 kilometro kaj ĝia formo estas pli-malpli cirkla. Staranta 780 metrojn super la marnivelo, Ponapo estas la plej alta en la mikronezia insulĉeno.

Ĉi tiu “florĝardeno de Mikronezio” havas densajn praarbarojn, montojn kaj intermontajn riverojn. Diversaj tropikaj floroj floras kun pompa beleco ĉie en la insulo. Inter ili troviĝas plumerio, ruĝa zingibro kaj bugenvilo. Manĝeblaj plantoj estas multaj: kokosoj, panarboj, mangoj, bananoj, mandarinaj, ananasoj, citronoj, maniokoj, taroj, ktp.

Por ĉefmanĝaĵo, kokoj kaj porkoj estas lasataj promeni libere, kaj el la ĉirkaŭanta oceano kapteblas fiŝoj en abundo. La 25,000 insulanoj vivas senurĝan kaj senzorgan vivon en ĉi tiu naturbenata ĉirkaŭaĵo, kiel se ili tiele vivus de la epoko de la dioj.

Oomoto havas rilatojn kun Ponapo ekde 1931, kiam UHA lanĉis projektojn de spirita, eduka kaj agrikultura entrepreno por la bono de insulanoj. Interŝanĝo de personoj inter la Oomoto-Centro kaj Ponapo daŭris ĝis 1935, kiam ĝi estis interrompita pro la 2a Oomoto-Afero kaj baldaŭ la 2a mondmilito. Pli frue, Onisaburo Deguĉi, kunfondinto de Oomoto kaj fondinto de UHA, planis vojaĝi al



La poem-steleo de Onisaburo Deguĉi

Ponapo, sed lia vojaĝo ne efektiviĝis siatempe.

En 1969, la rilatoj rekomenciĝis kaj fariĝis pli kaj pli intimaj dum la lasta jardeko. Kiel ni raportis en la antaŭa numero (p. 87), kelkaj ponapanoj vizitis nian Centron en la oktobro pasintjara.

Responde al ilia vizito kaj invito, grupo de 51 Oomotanoj, gvidata de s-ro Icuki Mimuro, reprezentanto de Oomoto, vizitis la insulon Ponapo por kvar tagoj, de la 14a ĝis la 17a de marto. En la 16a, ili celebris la inaŭguron de monumento, sur kiu estas gravurita poemo de Majstro Onisaburo Deguĉi. Tiun monumenton oni konstruigis por festi la 50-jaran jubileon pri la fondo de *Kaieiŝa*, aŭ la Asocio por la Disvolvo kaj Prospero de Ponapo, fare de Oomoto kaj UHA.

La dediĉo de la monumento plenumiĝis laŭ la rito de Oomoto. Ĉirkaŭ cent personoj partoprenis en la ceremonio. Ĉeestis la *Nanmarki* (estro de la Ponapanoj), s-ro Fridirich Iriarte, kaj la *Naniken* (reprezentanto de la Ponapa popolo), s-ro Salvador Iriarte kun iliaj familianoj.

Momenton antaŭ la komenco de la ceremonio, la ĉeestantojn surprizis maloftega vidaĵo en la ĉielo: ili ĉiuj observis klaran cirklan ĉielarkon ĉirkaŭ la suno, kian neniu vidis antaŭe krom unu ponapano, s-ro Ŝintaro Epel, kiu vidis la saman fenomenon en la mateno de la 8a de decembro, 1941, la mateno de “Pearl Harbor”. (La dato: la 7a de dec. en Havajo).



Du junulinoj senvualigis la monumenton, kaj la eleganta steleo el nigra granito aperis kun la poezia surskribo :

*Trans nubo nebuleta  
en la ĉielo fora,  
antaŭen jam impeta  
mi vojas al Ponapo.*

Ceremonio de *ŝakao*, la tradicia festeno de la insulo, sekvis la riton. La Oomotanoj trinketis el kokosŝela bovlo densan trinkajon, faritan el la pistita radiko de ŝakao-arbo, kaj gustumis diversajn pladojn de porkaĵo, kokajo, panfrukto, taro, tapioko kaj multaj aliaj tropikaj kuirajoj.

Post 40-jara intertempo, Ponapo kaj Oomoto povis reestabli sian antaŭan intiman interrilaton.

Destinita por ĉefurbo de la nova Mikronezia Federo, Ponapo havas brilan estontecon. La Nanmarki, la Naniken kaj s-ro Mimuro multe diskutis pri nia estonta aktiveco.

Masamiĉi Tanaka



S-ro F. Iriarte, estro de la Ponapanoj, kaj lia nevino oferas ritajn pinbranĉetojn al la altaro.



Ceremonio por la jubilea plantado de panarbo

## Intervjuo kun la Dekano de Canterbury-Katedralo



*La amika interrilato inter Oomoto kaj Canterbury-Katedralo, kiu komenciĝis kiam nia amatora trupo prezentis la noon Hagoromo ĉe Canterbury en majo de 1980 (vd. Oomoto, jan.-jun. 1980), pli profundigis kiam Dekano kaj S-ino Victor de Waal vizitis Oomoton ĉe la Centroj en Kameoka kaj Ajabe. Alveninte en Tokio la 9an de oktobro, ili rondvizitis la urbojn de Tokio, Kameoka, Ajabe, Nara, Oosaka, Kobe, Hiroŝima, Inbe kaj Kioto, antaŭ ol ili hejmeniris al Anglujo la 27an de oktobro.*

*Pasigante naŭ tagojn el tiu periodo en Kameoka kaj Ajabe, la Dekano kaj lia edzino havis la okazon familiarigi kun la historio kaj aktivecoj de Oomoto. Vivante ĉiutage en la tradicia japana medio kaj vivstilo, ili ĝuis spertojn ne nur de la malnova kulturo kaj tradiciaj artoj, sed ankaŭ de la pli modernaj aspektoj de Japanujo. La multaj*





S-ino Naohi Deguchi, spirita gvidantino de Oomoto, ricevas saluton de Dekano kaj S-ino de Waal, la honorindaj gastoj el Canterbury.

*kunsidoj kaj konversacioj okazintaj dum ilia vizito ĉe ni entenis tre gravajn aferojn, el kiuj Oomoto kaj Canterbury povas lerni multon pri la reciproka valoro, per kiu ili pli kaj pli fortigos sian ligan de amikeco.*

*Ni prezentas ĉi-sube la intervjuon, kiun Dekano de Waal afable konsentis al ni fari la 22an de oktobro ĉe nia Centro en Kameoka.*

*Gilkey: Dekano de Waal, ĉu vi bonvolus ripeti kion vi diris ĉe la pasinttaga kunveno pri la esenco de la Kristanismo?*

*de Waal:* En la koro de la Kristanismo estas la kredo, ke vivo estas trovata per morto, ke ni trovas nin mem, fordonante nin mem, ke ni trovas trezorojn per disdono, ke preparite por ĝin perdi, ni trovas vivon. Tial ni senpere kunsentas kun Oomoto pro la suferado, kiun ĝi travivis pro sia vizio pri la vero, pro la preteco de Oomotanoj suferi kaj morti pro tio, kion ili kredis la plej grava. Tio ĉi plene akordas kun nia plej profunda perceptado pri tio, kion Dio diras al ni, ke ni faru, kaj kun nia Kristana kredo je Dio, kiu donas sin mem. Kompreneble, la kruco de Kristo estas la centro de tio en nia kredo. Ni trovas relevigon per morto kaj novan vivon per sinofero.

*Gilkey: Koran dankon! Nu, en via saluto ĉe la unua akcepto, vi faris interesan mencion pri la kontaktoj, kiujn viaj prapatroj havis kun Japanujo kaj la*

*kaŭzoj, ke tio influis al vi multon atendi el via vizito ĉi tien.*

*de Waal:* Mia patra familio retroiras, kiom ni povas scii, al la komercoŝipa tradicio de Holando, kaj ili certe komercis en la Malproksima Oriento, kiel ni nomas ĝin, rigardante ĝin el la "Malproksima Okcidento", kaj certe estis ŝipestro, mia praavo, kiu komercis en la Ĉina Maro, sed ankoraŭ pli frue, mi estas certa, ili estis inter la unuaj, kiuj venis al Nagasaki.

Sed pli proksime, do, pli certe, mia patro venis al Japanujo, kiel ano de lia famili-firmo, ŝipanta ĉi tien en 1921. Li skribis pri Japanujo en siaj memornotoj kaj rakontis al mi diversajn aferojn, kiuj plezurigis min tre multe, kaj ankaŭ li ĝuis plezuron per tio. Post la milito, frato de mia patrino venis loĝi ĉi tie kaj ankoraŭ nun loĝas ĉi tie. Unu el la ĝojoj, kiujn mi atendas, estas reunuiĝi kun li, vidi lin kaj lian laboron ĉi tie. Mia patrino venis vidi lin antaŭ dudek jaroj kaj restis ĉe li ses semajnojn. Mi do havas multajn atendojn.

Krom tio, mi ja havis alian personan ligan Kristanan. Kiam mi estis konfirmaciita de episkopo, okazis ke li estis el Japanujo. Kaj mi amikiĝis kun japanaj episkopoj dum la Lambeth-Konferenco ĉe Canterbury en 1978. Unu mia filo, kiam lasita al si elekti, por kiu procesio de episkopoj li volus porti standardon, li elektis la standardon por la Nippon Seikōkai (Japana Episkopa Eklezio). Tiu standardo nun pendas en nia hejmo. Kaj nun, kompreneble, post kiam Oomoto kaj la Noo venis al ni, ni eniris en rektan intiman kontakton kun Oomoto kaj la japana kulturo. Nia vizito ĉi tien estas kristaliĝo de multe da atendoj.

*Gilkey: Pri la noa prezentado, ni scivolas, ĉu vi havis eĥojn aŭ reagojn — post la unua raporto, kiun ni ricevis siatempe — de la spektantaro aŭ kongregacio.*

*de Waal:* Ni ankoraŭ konstante ricevas komentojn. Ĉi-monate, eĉ kiam ni preparis nin por vojaĝo al Japanujo, ni ricevis leterojn de la spektintoj, kiuj skribas denove, kiel multe ili ŝatis ĝin. Kaj de tempo al tempo oni petis de mi informon pri libroj, kaj tial ĝia efiko ankoraŭ daŭras — same kiel ŝtono, ĵetita en lageton, disvolvas ondringojn.

*Gilkey: Ĉu estis iaj komentoj pri la televid-programo?*

*de Waal:* Jes, tre multaj homoj parolis pri ĝi, ĉar la programo estis elsendita tre vaste.

*Gilkey: S-ro Jano, vi havis demandon.*

*Jano: Nu, mi estis en Londono unu kaj duonan jarojn, kaj ĉar multaj junuloj forlasas la preĝejon nuntempe, ĉu vi havas iajn programojn por reteni ilin en la preĝejo?*

*de Waal: Multaj preĝejoj tre speciale zorgas pri junaj homoj, kaj mi pensas, ke tio estas aparte vera ĉe la preĝejoj, kiuj estas vivaj. Preĝejoj varias, unuj fariĝis iom tro maljunaj, sed la vivaj preĝejoj havas multajn programojn por junuloj. Certe, ni vidas multajn junulojn ĉe Canterbury. Mia propra sperto de pastro estis plejparte en la universitatoj, tial mi kompreneble laboris kun la junuloj ĉiam en la atmosfero vivoplena.*

*Ĉe la Katedralo ni havas, ekzemple, grandajn junul-tagojn plurfoje ĉiujare, kiujn miloj da junuloj partoprenas. Okazas muzikoj, paroloj kaj diskutoj. Ili renkontiĝas kun la Ĉefepiskopo kaj faras al li demandojn. Ofte, tio estas vera pilgrimo. Ili piediras multajn mejlojn, kelkfoje tra la nokto aŭ de la antaŭa tago, kaj tiel venas en la Katedralon. Ni ĉiam havas pilgrimojn de junuloj el ĉiuj partoj de Anglujo kaj Eŭropo. En tiaj okazoj la tuta loko fariĝas vibranta de vivo.*

*Gilkey: S-ro Jano, via edzino havis demandon, kiun ŝi volas fari al S-ino de Waal.*

*Jano: Ŝi petis min demandi, ĉar vi estas la edzino de la dekano, per kio viaj tagoj*

*Tosto al la Anglikanaj gastoj el Canterbury ĉe Rokuju no Jakata en Ajabe*



*estas okupataj. Kiajn specialajn kontribuojn vi trovas, ke vi estas alvokitaj por fari?*

*S-ino de Waal: Nu, mi havas pli da oficialaj funkcioj. Mi estas la Prezidanto de la Virina Societo. Estas la virinoj, kiuj servas la Katedralon, kiuj aranĝas la florojn, kiuj purigas kaj kiuj faras brodaĵon. Sed mi pensas, ke mia ĉefa okupo estas simple tiu de gastamo. Dum ordinara jaro ni kutimas akcepti ne malpli ol du-tri mil personojn en nia domo — por ripozo, por tagmanĝo, por granda akcepto aŭ por tute neformala akcepto. Mia tasko estas bonvenigi ilin kaj ebligi ilin interkonatiĝi unu kun aliaj kaj kun ni.*

*Tamen, mia aparta intereso estas multe malpli en la publika flanko de nia vivo. Mi estas unu el tiuj, kiuj iniciatis la jaŭd-posttagmezan meditadojn por paco en la Kripto de la Katedralo. Vere, tio estas tre simpla: ni, grupiĝintaj el ĉiaj konfesioj, genuiĝas antaŭ kandelo sur la planko de la Kripto kaj silente preĝas. Alia afero, kiun mi faras kun plezuro, estas konduki homojn ĉirkaŭ la Katedralo nokte, kiam la Katedralo estas malluma. Ni rondiras per kandelbrilo kaj mi gvidas ilin en serion da meditotoj ĉe diversaj partoj de la Katedralo — speco de pilgrimado kombinita kun meditado.*

*Mi min ne ĝenas aldoni, ke laŭprofesie mi estas historiisto. Mi estas instruisto por la Nefermita Universitato, kaj mi instruas historion al tiuj, kiuj preparas sin por ordinado al la pastreco. Kiam ajn mi havas tempon, mi faras verkadon.*

*Gilkey: Dekano de Waal, kiajn impresojn pri Oomoto vi havis dum via vizito?*

*de Waal: Nu, tio kompreneble bezonas tre multe da tempo por digesti. Tiel grandan animskuon mi ja sentis, kiel vi eble komprenas. Sed kion mi diris ĉe la akcepto hieraŭ vespere, tio, mi kredas, resumas kion mi travivis. Ni sentis profundan spiritecon en Oomoto kaj en ĉio, kion Oomoto faras, nome, la unuecon de kredo kaj praktiko. En Oomoto tio ĉi penetras ĝis la koro de la homa vivo, en la harmonio kaj la ekvilibro inter kredo kaj laboro per la manoj. Tion oni povas vidi en la artoj kaj en la interhomaj rilatoj, en la delikata, harmonia kaj sentema maniero, en kiu vi rilatas unu la alian inter vi, kaj kun aliuloj, kaj tiamaniere vi ebligas al ĉiuj, kiuj kontaktiĝas kun vi, lerni la interrilaton inter la homo kaj la medio. Tio manifestiĝas en la maniero, en kiu viaj konstruaĵoj estas dismetitaj en la ĝardenoj, en la formo de manĝado kaj vestado, kaj en la unueco de viaj vivoj. Kiam oni renkontas Oomotanojn, kiel ni mem renkontis ilin en la diversaj urboj, kien ni vizitis, oni vidas, ke ili, evidente same kiel ni, okupiĝas pri la ĉiutagaj aferoj de la moderna mondo, sed ke ili havas ĉi tie*

— en la sankta loko — la sekurecon de sia ekzisto, radikon nutratan de ilia religio. Kaj ambaŭ lokoj, kiuj estas gravaj por Oomoto — Kameoka kaj Ajabe kun la sanktejoj — estas la hejmo por ili ĉiuj.

En tio ni rekonas ion paralelan ĉe ni en nia Kristana tradicio, ĉar ni ankaŭ havas sanktajn lokojn kaj belajn lokojn — preĝejojn, sanktejojn, monaĥejojn, kiuj estas ligitaj kun la koro de nia Kristana vivo. Kaj tiuj el ni, tiuj, kiuj multe okupiĝas pri la ordinara aferoj de la mondo, bezonas la spiritan forton, kiu venas de tia religie nutrata vivo.

*Jano: Ĉu vi iom rakontus al ni pri via intervidiĝo kun la Spirita Gvidantino Naohi Deguĉi?*

*de Waal:* Jes, kun plezuro. Verdire, antaŭ ol renkonti ŝin, ni sentis ke ni jam renkontis ŝin tial, ĉar ni vidis ĉion, kion ŝi kaj ŝia patrino kaj ŝia avino inspiris ĉe Oomoto. Ni sentis, ke ni jam vidis ŝin en la tuta medio de la loko, en la spirito de Ajabe kaj Kameoka, en ŝiaj tebovtoj, potaĵoj kaj teksaĵoj. Ĉie ni renkontis ŝin. Tial, kiam ni efektive vidis ŝin, ŝi jam estis nia konato. Kaj kompreneble ni estis ravitaj de ŝia rideto, ŝiaj okuloj kaj ŝia esprimo, kaj la simpleco kaj varmeco de ŝia saluto. Tio entute kortuŝis nin kaj ni sentis nin tre privilegiitaj ĉeesti antaŭ tiu, kiu estas tiel profunde spirita kaj tiel plene homa.

*Gilkey: Sur persona nivelo, ĉu ni povus demandi vin, kiu en la mondo meritas vian plej grandan respekton? Kian specon de persono vi plej admiras hodiaŭ?*

*de Waal:* La personoj, al kiuj mi sentas min plej simpatia, estas tiuj ĝenerale, kiuj ne nur kritikas la manieron, en kiu nia mondo, precipe nia riĉa mondo vivas kaj iras, sed ankaŭ alte tenas profetan averton, kaj provas igi nian mondon havi konscion, ke nia homeco kaj nia vivmaniero estas minacataj. Mi pensas pri la maniero, kiel ni — tiuj el ni, kiuj vivas en la riĉaj landoj — toleras la teruran misuzadon de la mondaj disfontoj, la avarecon de nia riĉa mondo, la manieron, en kiu ni rifuzas respekti la dignon kaj la postulojn de la malriĉaj pro nia egoismo, la manieron, en kiu ni daŭrigas disipi niajn disfontojn por armadoj kaj aliaj malutilaj aferoj, la manieron, en kiu ni rifuzas uzi niajn riĉaĵojn por riĉigado de la homara vivo.

Kaj, kiu *vidas* tion ĉi? Troviĝas gvidantoj en ĉiuj landoj, kelkfoje politikaj gvidantoj, kelkfoje spirita gvidantoj, kelkfoje artistoj, verkistoj, kiuj *vidas* tion ĉi, tiel, ke unuflanke estas la vizio de la unua spirita gvidantino de Oomoto pri la espero de la mondo, kaj aliflanke la vizio pri katastrofo. Ŝia vizio ja estas nuntempa. Unu el la aferoj de Oomoto, kiun



Rigardado al artverkoj en la Ekspoziciejo de Oomoto en Kameoka

mi trovas tre frapanta, estas, kiel aktuale ĝi estas nuntempa en ĉiu maniero, ne nur nuntempa, sed ankaŭ plua al la estonteco. La vizio ekzistis jam de la komenco de Oomoto — pri la potencialoj de la homo, pri la espero de nia mondo, pri la starigo de paco, pri repacigo kaj harmoniigo inter la homoj, kaj inter la homo kaj la socio. Kaj ankaŭ la vizio, ke nia mondo estas kuranta al katastrofo. Kiel trafa ĝi estas!

*Gilkey: Tiel statis ankaŭ en 1892.*

*de Waal:* Ekzakte! Kaj tiel ankoraŭ statas.

*Gilkey: Laŭ la tutmonda ekumena tendencó, ĉu vi opinias, ke la renkontiĝo de Canterbury kaj Oomoto havas ian specialan rolon por ludi?*

*de Waal:* Tre grandan, jes. Dum multaj jaroj ni Kristanoj diskutadis inter ni, Katolikoj kaj Protestantoj kaj Ortodoksuloj, pri niaj diferencaj Kristanaj tradicioj, kiuj unuigas nin aŭ dividas nin. Ĉar se la Kristo kaj lia kruco estu signo de repaciĝo en la mondo, tiam almenaŭ ni devas repaciĝi unuj kun aliaj kaj vivi en paco.

Sed tiu ekumena movado en la lasta generacio komencis plivastigi la dimension de sia rekono, ke la Kristanismo estas nur unu el la grandaj



religioj de la mondo. Tio ne signifas, ke ni ne kredas profunde, ke ni havas ion de supermezura valoro ne nur por ni mem, sed ankaŭ por la tuta mondo, sed signifas, ke ni bezonas eniri en dialogon kun la aliaj religioj de la mondo, por malkovri kune, kien la homaro estas gvidata.

Mi pensas — en tre, tre malgranda maniero: semoj estas aferetoj sed



La Dekano provanta super  
japana potista tornilo

kreskas en aferegojn. La renkontiĝo de Canterbury kaj Oomoto estas unu semo jam semita. Kaj el tiu ĉi semo granda afero povas elkreski. Mi persone trovas min multe plifortigita, tre multe iluminita per mia renkontiĝo kun Oomoto, ĉar en Oomoto troviĝas tre multaj aferoj, kiuj iluminas mian propran tradicion kaj lumige refreŝigas la multon, kiu kuŝas en mia propra Kristanismo. Kaj mi kredas, ke tie troviĝas ponto de rara valoro.

*Gilkey: S-ino de Waal, ĉu ni povus peti de vi ian mesaĝon por la Oomotaninoj?*

*S-ino de Waal:* Tute male, mi havas ĉion por lerni de *ili*. Mi ricevis multon de *ili* en la esprimo de gastamo, tiu mirinda respekto reciproka, respekto por la manĝo, per kiu *ili* servas al ni, kaj la maniero, en kiu ĝi estas tiel bele elektita kaj aranĝita — la sento de harmonio kaj proporcio, kiam mi trovis ĉe Oomoto, impresis min kiel tre grava.

*Gilkey: Kaj nun mi demandas la Dekanon, ĉu li havas mesaĝon por la sekvantoj de Oomoto.*

*de Waal:* Tio ĉi estas nur tuja respondo, do ne pripensita, sed unu afero, kiun mi povas diri: eĉ se ŝajnus al kelkaj, ke Oomoto per sia konscia gvido pluigas la malnovajn tradiciojn kaj tiel dediĉas sin por daŭrigi la pasintajon viva, oni zorgu, ke neniu lasu sin misgvidi. Ĉar tiu pasintaĵo, tiu tradicio estas sentempa kaj havas multon komunan kun la estonteco de la homo. Tio ne estas afero de paseismo. Vi celas al la potencialo de la homo, al la estonteco de la homo, kaj en tiu senco donas grandan esperon al la socio, kiu estas pliparte perdita en sia vojo, por indiki, kion signifas esti *homo*.

*Gilkey: Kio, laŭ via opinio, plej interesos vian kongregacion, por aŭdi pri via vojaĝo, kiam vi hejmeniros al Anglujo?*

*de Waal:* Ne eblas komuniki al *ili* nian sperton en rekta maniero, ĉar al ni, kiuj multe legis antaŭ ol ni alvenis, evidentiĝis, kiel necesa estas 'unu-vida' sperto, por ke oni vere komprenu ion.

Tamen, tiu respondo, kiun mi ĵus antaŭe faris al vi, kiam vi petis mian mesaĝon, estas la sama mesaĝo, kiun mi havas por miaj homoj — por la eklezio en Anglujo. Ni tre konscie dediĉas nin al la tradicio, kaj demandas, kion tiu ĉi tradicio povas fari kun nia teknologia, eksplodema epoko. Unu el la aferoj, kiujn ni spertis ĉi tie, ĝuste rilatas al tio, ke ni alteniĝu al nia propra tradicio, kaj malkovru, kion ĝi povas kontribui al la mondo.

Por mia propra laboro, mi ricevis inspiron el mia sperto ĉi tie, kaj eble en tiu sfero mi faros kelkajn novaĵojn, originantajn el Japanujo.

*Gilkey: Ĉu vi havus ian ideon, ke Canterbury povus helpi al ni havi pli klaran komprenon kaj pli efike kunlabori en la klopodoj transponti inter Okcidento kaj Oriento?*

*de Waal:* Nu, mi ne scias, ĉu tio ĉi respondos vian demandon, sed dum la lasta semajno mi fojfoje deziris, ke pluraj el via komunumo venos al ni por ke *ili* havu tian saman specon de spertoj en Okcidento, kiam ni havis ĉi tie. Tiam, eble *ili* spertos refreŝigon de sia sinteno al siaj propraj tradicioj, kaj trovos, kio estas grava en tiuj — se *ili* povos vidi la samajn principojn aplikataj en diferenca religia kaj kultura medio. Tio samtempe iluminos okcidentanojn, kiuj vidos manieron, en kiu antikva kulturo, same antikva kaj multrilate pli antikva, ol la ilia, provas perfekte

harmoniiĝi kun la moderna vivo kaj tiel povas kontribui al ĝi. Kaj vidi, ke por fari tion ne ekzistas ia unu sola maniero, ke por okcidentanoj ekzistas alia maniero, kaj tio entute prilumos al ĉiuj tion, je kio la homo kapablas kaj por kio la homo ekzistas.

Se tiamaniere vi povos submeti vin, aŭ kelkajn el vi, iom pli al kio estas plej profunda en niaj propraj tradicioj, tio povos helpi al vi. Ni havas monaĥan tradicion de komunumoj. Mi volus ekzemple, ke la komunumo de monaĥinoj apud Canterbury, enfermita komunumo, spertu la teceremonion. Mi estas certa, ke ili tuj komprenos ĝin.

*Gilkey: Ili ŝatos ĝin, mi estas certa.*

*de Waal:* Tuja kompreno! Kaj reciproke ankaŭ por tiuj, kiuj venis kun la teceremonio, kiuj loĝos portempe en tiu komunumo kaj vidos, kiel la monaĥinoj, laŭ sia maniero, faras samajn aferojn kaj vivas saman specon de la vivo. Kvankam ni ne povus atendi, ke vi tre baldaŭ venos al ni, je tia eksterordinara elspezo, kun la no-grupo kaj aliaj, tamen en pli malgranda grupo vi povos veni eble por pli longa periodo kaj resti ĉe kelkaj el niaj komunumoj kaj travivi iom de nia tradicio. Kaj Canterbury mem — se vi eniras en tiun Katedralon kaj meditas, kiel ĝi estis konstruita kaj kial ĝi estis konstruita tiamaniere, kiel vi vidas — helpus al vi plivastigi vian komprenon. Mi tamen ne scias, ĉu tio respondas al via demando.

*Gilkey: Jes, tre utila.*

*Jano:* Mi aŭdis, ke vi tre interesiĝas pri potfarado. Koncerne ĉi tian interesiĝon, mi demandas vin, ĉu vi trovas ian religian signifon en tio, ke junuloj nuntempe sin turnas al manlaboro. Ekzemple en Japanujo nuntempe junuloj forlasas la oficejojn aŭ oficaĵajn laborojn. Ĉu tio havas ian religian signifon?

*de Waal:* Mi ne volas ĝin nomi “religia”, kiel speco de aparta kategorio. Sed la respondo, mi pensas, estas jes, ĝi estas “religia” en la plej vasta senco, laŭ kiu vi en Oomoto komprenas ĝin: la unueco inter artoj kaj la vivo. Mi pensas ke troviĝas malfalsa deziro trovi manierojn, en kiuj ni povas labori per niaj manoj. Vidu, kiel ĝenerale kaj tute ne kaŝite okazas multe da frustrigoj (vi scias, ĉar vi loĝis en Londono, kiel teruraj estas la aktualaj frustrigoj de la junuloj vivantaj en la Okcidento), kaj la perfortoj, la vandalismo kaj la senkoreco de tiel multaj estas kaŭzataj de la terura manko de ia krea laboro, kiajn ili povus fari per sia vivo kaj propra memo. Kaj nun ni havas la seriozan problemon de senlaboreco ĉe la junuloj finintaj la lernejojn, kaj pli ol duono da ili estas senlaboraj. Nia eduka

sistemo ankoraŭ estas tiel maltaŭga. Sed, jes, mi pensas, ke ĝenerale la povoscio de multaj homoj nun fari proprajn objektojn por sia hejmo estas kuragiĝa. Tio havas religian signifon, ĉar temas pri la pleneco de la hejmo.

*Gilkey:* Nu, ... niaj redakciaĵoj scivolos, dum viaj kvar filoj estis edukataj hejme, kiaj estis la preceptoj aŭ devizaĵoj, kiujn vi persone emfazis por ilia edukado.

*de Waal:* Nu, se nun vi intencas publikigi ĉi tion en la revuo de Oomoto, vi ne povos sendi eĉ unu ekzempleron de ĝi al Canterbury. (Rido)

*Sino de Waal:* Mi pensas, ke ni je la plej profunda nivelo trovis intiman rilaton inter la Benedikt-monaĥeja spiriteco kaj la spiriteco de familia vivo, kaj mi povus detaligi ĝin.

*de Waal:* Ŝajnas, ke ni nur parte sukcesis kompreneble. Sed antaŭ ĉio ni havis respekton, ke ili estas malgrandaj infanoj. Ili devas esti traktataj kiel homoj kun respekto. Ekzemple, ni ĉiam aŭskultis kaj aŭskultis al tio, kion ili diris. Kaj se mi ne komprenis, mi petis ilin klarigi kion ili volas diri, kaj ripeti ĝin. Mi provis ne diri, “Ho, jes, jes,” ne aŭskultinte. Ĉiam aŭskulti, ĉiam kun respekto al siaj infanoj.

Kaj gravas scii, ke infanoj bezonas ĉiam certigi al si la sekurecon de



Pilgrimo al, kaj preĝo sur la monto Takakuma

sia ekzisto, kie ajn ili troviĝas. Bezonata estas ia kadro de disciplino, de rito, por ke ili lernu, ke arbitra, laŭplaĉa konduto ne eblas. Ĉar libereco estas lernebla, nur protektate, en la sekureco de ama medio kaj en la sekureco sub ia speco de disciplino. Sed ĉi tio estas nur skafaldo. Ĝi ne estas por si mem; nek la rito nek la disciplino ekzistas por si mem. Oni starigas skafaldon ĉirkaŭ domo konstruata, sed forigas ĝin kiam la domo estas preta. Tiel same okazas ankaŭ por starigi aŭ eduki la infanon ke ĝi havu sian liberecon, por ke ĝi povu fari sian propran decidon kaj vivi sian propran vivon.

Kaj oni ĉiam povas ĝui siajn infanojn, malgrandajn infanojn, per sia rigardo aŭ imago, ĉu ili iam fariĝus tiel ĉarmaj kiel nun. Ĝuu ilin ĝissate. Por ni la manĝoroj, precipe, la vespermanĝo kune: ankaŭ tie ni havas certan tradicion specialan de nia familio. En la vespero ni ĉiam bruligas kandelon sur la mezo de la tablo. Ni ankaŭ diras preĝon, kunmetinte la manojn kaj benante la nutraĵon. Ni uzas la okazon de nia familia tablopreĝo, por esprimi tion, kio ajn tiam regas en nia koro — se iu forestas, ekzemple, kaj havi kiel anon de nia familio iun ajn vizitanton, kiu sidas ĉe la tablo kun ni.

*Jano: Ni volus scii ankaŭ, kiaj specoj de la japanaj kuiraĵoj plej plaĉis al vi.*

*Sino de Waal:* Menciindas via aparta sentemeco por la sezona manĝo en Japanujo. En la Okcidento ĉio nun estas enpakita kaj fridigita, kaj ni tute perdis kontakton kun la trajtoj de la naturo, kion mi sentas tragika perdo.

*Gilkey:* Ĉu vi ankoraŭ ne vizitis unu el niaj superbazaroj ĉi tie? Ankaŭ ni akiras tiel rapide kiel vi la enpakitajn kaj fridigitajn. Ĉio alvenis.

*de Waal:* Ni do spertis eble la plej bonajn. Tamen, el vidpunkto de la tradicioj, kiujn ni jam preparolis antaŭe, la manĝo havas ion pli ol dekoran. Ĝi estas tre grava parto de nia vivo, kiel ni manĝas, kaj kion ni manĝas, kaj kiam ni manĝas, kaj kiel ni kune manĝas, kaj tiel plu. Unu el la senhomecigaj aferoj de la moderna mondo montriĝas en la maniero, kiel oni traktas kaj prenas manĝojn. Certe, kio frapis min, estas via manĝmaniero, la beleco de manĝo, la koloro, la teksturo, la iloj. Preni per manĝbastonetoj vere helpas al ni respekti la manĝon multe pli, ol per tranĉilo kaj forkō. Tio estas, eble, ĉar ne kutimiĝintaj al la manĝbastonetoj, ni devas manĝi iom pli malrapide. (Rido)

*Gilkey:* Alia brula demando. Dekano de Waal, kiam vi estis juna, ĉu vi iam pensis

*fariĝi io alia, ol pastro en la preĝejo?*

*de Waal:* Ho, jes! Mi estis ano de ŝipad-oficejo en Londono. Kiel mi diris, mia patro ŝipadis, kaj estis destinite, ke mi okupiĝu pri la aferoj en ŝipad-kompanio. Mia frato nun estas direktanto. Sed post du jaroj mi forlasis mian okupon. Kaj en mia familio mi estas la unua persono, kiu eniris en la preĝejon, kaj tio ŝokis la familion!

*Jano:* Kaj Sino de Waal, kian ambicion vi havis?

*Sino de Waal:* Mi estis bonŝanca. Mi fariĝis historiisto, kiel mi volis, kaj tia mi restas la tutan vivon ĝis nun.

*Jano:* Ĉu la eŭropa historio?

*Sino de Waal:* La angla historio. Mi estas tre feliĉa ĉar mi neniam forlasis mian okupon, ĉu de lekciado aŭ de verkado — la tutan tempon dum elkreskis niaj knaboj.


*Gilkey:* Ĉiu demandis min, Dekano de Waal, kie en Holando vi naskiĝis.

*de Waal:* Amsterdamo.



Dekano de Waal ricevas ritan pinbranĉeton por oferi al la altaro.





La Dekano plenumas finan preĝservon en la Banŝōden-sanktejo, Kameoka.

*Gilkey: Ĉu vi intencas sendi iun el la Katedralo al Oomoto por la Somera Seminario de la Japanaj Tradiciaj Artoj?*

*de Waal: Ni esperas ke niaj filoj partoprenos kaj unu filo jam en la venonta Seminario.*

*Gilkey: Ni jam scias pri via interesiĝo en la ceramiko. Ĉu vi havis ajnan okazon el via ŝargita horplano, por rigardi japanajn potaĵojn kaj bakfornojn?*

*de Waal: Ĉe Oomoto oni zorge aranĝis, ke ni disponu unu tagon por tio. Lunde, de tagmezo ĝis vespero, ni estis ĉe la du ceramikistoj, Sozan Kaneŝige kaj Miĉiaki Kaneŝige, kaj pasigis la tempon en iliaj potfarejoj, laborante super argilo kaj vidante tre multajn potojn. Ili posedas grandan kolekton da potaĵoj, datigantaj de plej fruaj tempoj. Ni do vidis tre grandan nombron...*

*Gilkey: Ĉu vi mem komencis fari ceramikaĵon, aŭ ĉu pere de via filo, kiu...?*

*de Waal: Mi komencis ĝin antaŭ kelkaj jaroj, kiam mia filo kaj mi eklernis potfaradon ĉe art-lernejo. Mi tiam multe progresis en tio, kaj nun mi*

estas instigata fari ĝin denove, ĉar ni havas ĉe Canterbury ekstreme talentan potiston, kiu ankaŭ estas tre bona instruisto.

*Gilkey: Ĉu ni povus demandi, kian rolon la individuaj membroj de la Eklezio de Anglujo povas ludi por akceli la mondan pacon?*

*de Waal: Ni estis, kiel vi povas imagi, profunde kortuŝitaj en Hiroŝima. En la tiea muzeo, mi estis kortuŝita de tio, kion la direktoro diris al mi, "Iru kaj diru al ĉiu kion vi vidis", kaj kompreneble li estis absolute prava. Tio estis tre bona tago, ĉar ni komencis ĝin de Hiroŝima, kie ni vidis la nekredeblan malhumanecon de homoj al homoj, kaj veturis al la potfarejo en Inbe, kie ni vidis la kreivan flankon, la kvietigan post tiu harstariga dolora sperto ĉe Hiroŝima. Oni donacis al ni ŝildon kaj ni pendigos ĝin en la Katedralo, eble sub la porpaca montra fenestro. La Anglikanaj episkopoj eldiris sian sintenon tre klare por paco, same kiel la Papo faris. Sed via demando temas pri individuoj, kion ili povas fari. Ekzistas tre malnova Okcidenta organizaĵo, nomata "The Fellowship of Reconciliation" (Frataro de Repacigo), kiu estis fondita en 1914, ĵus antaŭ la unua mondmilito, en Anglujo kaj Germanujo, kaj transvivis ĝis nun. Multaj fratoj pilgrimos al Canterbury por la venonta Pentekosto. Troviĝas Anglikana pacista frataro. Unu el miaj antaŭintoj de Dekano de Canterbury, Dick Sheppard, estis tre respektata gvidanto de la pac-movado en la 1930aj jaroj.*

Mi pensas por ni en la nuna momento, ke tio multe temas pri demando, kiel individuaj homoj, ne nur Kristanoj, tenu sin politike, ĉar la afero estas politika demando en la plej profunda senco. Ili ĉiuj devas veni al Hiroŝima! Ŝajnas, ke ankoraŭ ne ĉiuj eklezioj eldiris sian sintenon per unu klara voĉo kontraŭ la nukleaj armiloj. Sed ŝajnas al mi tute neimagebla, ke ekzistus iu, kiu iam ekpensus denove uzi nukle-armilojn aŭ amasdetruilojn.

Oni faras preĝojn por paco, sed, kiel Ĉefepiskopo Ramsey kutimis diri al ni, preĝi por paco estas danĝera afero por fari, ĉar tiam vi trovas vin laboranta por paco. Vi ne povas fari nur unu kaj ne la alian. Ĉar la paco signifas ankaŭ justecon.

*Gilkey: Mi ofte pensas pri la duelo, kiu iam estis akceptata kiel socia kutimo en nia kulturo. Pro honoro, foje okazis, ke oni devis elpreni pistolon kaj pafi certan homon. Nuntempe jam neniu duelas. Ĉu eblas, ke ankaŭ milito iam fariĝos pasinta barbaraĵo en la sama maniero?*

*de Waal: En la tagoj de mana batalo, la afero konis limojn kaj havis regulojn,*

kaj la interhoma kontakto estis tiel proksima, ke la ago de ĉiu tuj reagis sur lin mem. Sed tiu interspaco fariĝis granddistanca — nur pensu pri la aviadilo faliginta atombombon kaj la faligintoj, supre sendanĝeraj en la aero! Kaj pensu pri la ŝtatviroj, Roosevelt, Attlee kaj aliaj, kiuj decidis, ke jes, faligi ne unu, sed du atombombojn, estante mem en la granddistanca loko for de la rektaj efikoj de iliaj decidoj kaj agoj! Kaj nun en la Okcidento homoj denove parolas pri la ebleco de nuklea milito, sed en tia maniero, kiel ili ne parolis pri ĝi antaŭ du-tri jaroj. Tio estas terura afero.

*Gilkey: Sed tuj, kiam la vento komencos disblovi la radioaktivan falaĵon ĉirkaŭ la terglobo, tiu distanco ne plu povos esti tiel granda, ĉu ne? Certe ni jam scias pri la fakto, ke ni eksplodigos nin mem.*

*de Waal: Nu, mi pensus same, sed tiel eksterordinara estas ja la maniero, en kiu ili nun parolas pri limigita nuklea milito, kiel pri ia purigita speco de milito — ili nur tute ne enkalkulas ĉion, kion ĝi nepre kuntrenos, kiel ni povas vidi en Hiroŝima. Kiam oni vidas la totalan detruigon de Tokio kaj Hamburgo kaj Dresdeno, kaj ankaŭ Vjetnamo tiurilate — la inferajn aferojn, kiajn ni kapablas fari, oni vidas, mi pensas, kiel frapaj kaj trafaj estas la vizioj pri katastrofo en la sanktaj skriboj de Oomoto!*

*Gilkey: Nu, Oomoto diras, ke ni devas purigi nin mem kaj ŝanĝi niajn korojn.*

*de Waal: Ekzakte. Estas neniu alia maniero.*

*Gilkey: Aparte de niaj demandoj, ĉu vi havus ion, kion vi mem volus priparoli?*

*de Waal: El la vidpunkto de miaj spertoj ĉi tie, mi volus diri, ke tiu pilgrimo sur la monton al la kaverno, kie la asketismo de Onisaburo okazis, estis signifoplena por mi, kaj mi volas konservi kiel memorajon tiun bastonon, kiun mi portis tiam. Ĝi estas grava por mi.*


*Jano: Ĉu vi trovis apartan atmosferon ĉe Ajabe?*

*de Waal: Ni restis tie nur unu tagon, sed mi estis treege impresita de la tombejoj de la fondintoj, de la sanktejoj, de la tedomoj, de la ĝardenoj... Ĉe la tombejoj de la fondintoj mi sentis grandan aleston.*

*Gilkey: Nu, kiam mi unuafoje venis al Oomoto kaj komencis studi ĝian doktrinon, mi estis impresita de la instruo pri la komuna origino de la religioj. Mi venis de tre parohisma religia medio, kie oni tre fieras ke oni apartenas jen al ĉi tiu splinto de la Baptista sekto, jen al tiu branĉo de la Metodismo, kaj tial mi trovis tre refreŝiga rigardi la religiojn kiel diverskolorajn florojn en la sama ĝardeno.*

*de Waal: Mi pensas, ke la imago pri la ĝardeno estas bona, ĉar ni efektive estas diverskoloraj floroj, sed ni ne estas ĉiuj la sama floro. La afero*

Dekano kaj S-ino de Waal kontemplas ĉe la Ŝtongardeno de Rjōanĵi en Kioto.



# La Historio de Oomoto

William Gilkey

Oomoto kiel religio naskiĝis en 1892, kiam la granda spirito, Uŝitora no Konjin, komencis uzi Nao Deguĉi kiel mediumon por siaj komunikadoj. La grupo, kiu formiĝis ĉirkaŭ Nao, restis loka organizo centrita en Ajabe, nordokcidente de Kioto, ĝis la alveno de Kisaburo Ueda, kiu edziĝis kun la plej juna filino de Nao, Sumiko, kaj adoptis la nomon Onisaburo Deguĉi.

Onisaburo komence spertis oponadon de la grupo ĉirkaŭ Nao kaj de la registaro, kiu rifuzis oficialan sankcion al la nova religio. Tamen, post la okazintaĵo sur Kamiŝima, la oponantaj elementoj interne de la religio grade kolapsis, kaj pli frue ol la morto de Nao en 1918, Onisaburo firme regis la aferojn de Oomoto. Sed la registara malamikeco kaj suspektemo ankoraŭ restis problemo.

povas degeneri kaj ofte degeneras en la populara menso, ĝis oni diras ke ni estas ĉiuj la samaj kaj iras la saman vojon kaj tute ne gravas, je kio vi kredas — kio NE estas tio, kion tiu afero diras. La vera graveco de la renkontiĝo de religioj kuŝas en la malkovrado de komuna tereno kaj en la enriĉigado al la diferencaj tradicioj, kaj en la reciproka iluminado de tiuj tradicioj per renkontiĝo, tamen analizante ne nur la diferencojn, sed ankaŭ la unuecojn. Kaj kien tio kondukos fine, ni devas lasi en la manojn de Dio. La afero ne estas konverti unu la alian, nek projekti ian novan specon de sintezo. Tio kuŝas en la estonteco.

*Gilkey: Sed ni devas fari ion, kaj kio estas la plej bona, kion ni povas fari?*

*de Waal:* La plej bona afero, mi pensas, estas ja daŭrigi la dialogon, ja renkontiĝi kaj interparoli kaj partopreni kaj rezoni. Kaj aŭskultado estas pli grava, ol parolado. Kaj la amikeco. Gravus ne tio, kion ni instruas al la aliulo, sed tio, kion ni aŭskultas kaj lernas.

*Gilkey: Kaj tia speco de silenta enriĉigado, kia venas el ĉi tiaj interkulturaj kontaktoj.*

*de Waal:* Kaj aŭskulti kaj lerni. Mi serioze pripensas tion. Treege!

Trad. K. Aojagi

## OOMOTO DISVOLVAS SIAJN FLUGILOJN

Kvankam Uŝitora no Konjin en la skriboj de Nao Deguĉi vokadis plu por rekonstruo de la mondo, estis preskaŭ nenio, kion la fondintino povis fari, por disvastigi la instruojn de Oomoto ekster la ĉirkaŭ mil kamparanoj kaj urbanoj, kiuj formis la kredantaron en Ajabe. Sed de post la grava okazintaĵo sur Kamiŝima, kaj kun Onisaburo ĉe sia posteno de gvidanto, Oomoto komencis disetendi sian influon tra Japanujo kun miriga rapideco. Komence la kunfondinto uzis la preleg-estradon kaj skribadon por diskonigi siajn ideojn. Por tio, ekde 1917, li havis je sia dispono la periodaĵojn *Ajabe-Ŝinbun* (Ajabe-Novajoj) kaj *Ŝinrei-kai* (La Mondo de la Spirito), ambaŭ presatajn

ĉe Ajabe.

La reago al tiuj klopodoj surprizis ĉiun. Verkistoj, erudiciuloj kaj intelektuloj invadis Oomoton, por ĉeesti prelegojn kaj partopreni en religiaj servoj. Aparte surpriza estis la nombro de oficiroj el la imperia mararmeo, kiuj montris interesiĝon. Ankaŭ junaj homoj horde venis al la centro ĉe Ajabe. Estus interese konjekti, kiuj aspektoj de la penso de Onisaburo tiel magnetizis la mensojn de tiuj vicoj da vizitantoj. Ĉu tio estis la spirita elemento, proponanta ion nepercepteblan por la malvasta pragmatismo kaj materialismo de la epoko? Aŭ la emfazo sur internacia kunlaboro kaj mond-rekonstruo en la etoso fariĝanta ĉiutage pli ŝovinisma? Aŭ eble la voko por la paco kiam militistoj ĉiam pli firme prenis en siajn manojn la potencon de

Memoriga foto de la policoficiroj pozantaj antaŭ parto de la detruitajoj de Oomoto (1921)



registaro?

Senbezone diri, ke la subita kaj neatendita populariĝo de Oomoto ne iris ne rimarkate en aliaj rondoj kaj venigis pli kaj pli furiozan kritikadon el diversaj religiaj grupoj kaj la gazetoj generale. Homoj ne toleras, ke ilia konscienco estu pikata, kaj klopodoj levi la moralan nivelon trenas kun si sian danĝeron, tro ofte en la tendenco vekti la plej venenan malamon.

Tute maltima, Onisaburo konstante pligrandigis la amplekson de la aktiveco de Oomoto. En 1917 li aĉetis la terenon de Kamejama-Kastelo en Kameoka, ne malproksime de Anao, lia naskiĝloko. Tiu ĉi aĉetaĵo ebligis, ke oni starigu duan centron por Oomoto. Tio estas signifoplena, ĉar Kameoka estas multe pli proksima al la grandurba Kioto (dudek-du kilometrojn), ol al Ajabe (kvindek-ses kilometrojn). Ajabe situas en montara regiono, izolita for de la puŝoj kaj konfuzoj de urba vivo. Ĝi estas idilie soleca, kun sia sereneco invitanta la specon de spirita komunikiĝo, por kiu saĝuloj de post tempo nememorebla serĉis sovaĝejon aŭ kavernon en la montoj.

Kameoka estas diferenca. Kvankam montpasejo apartigas ĝin disde Kioto, Kameoka tamen estas multe pli facile alirebla de la grandurbaj centroj de Kioto, Oosaka kaj Kobe. Ĝi fine fariĝus la centro de Oomoto por ties internaciaj aktivecoj kaj la "vizaĝo", kiun Oomoto prezentus al la mondo. La distanco inter Ajabe kaj Kameoka restis geografia simbolo por la dinamikaj aspektoj de Oomoto, kiuj neniam tute intermiksiĝis.

Ĉar daŭris kunekzisti interne de la organizo internaciaj elementoj kaj samtempe tre fortaj naciaj elementoj. Oomoto propre estas religio de kamparana origino, tamen la pensoj de Onisaburo aldonis dimensiojn, kiuj per sia universala apelacio altiris la plej progresemajn pensulojn pri la demandoj de tutmonda sintezo. Fakte, tiu kontraŭeco neniam ŝajnis tute dissolviĝi eĉ en la menso de la kunfondinto mem. Hodiaŭ li povis aserti, ke ĉiuj religioj en la mondo egale estas emanoj el unuopa dia impulso, kaj morgaŭ pledi por la supereco de Japanujo, kiel die destinita. Ĉe liaj prelegoj patriotoj kaj internaciistoj sidis unuj flanke de la aliaj, kaj ĉiu grupo trovis apogon por sia propra ideo.

Intertempe la enfluo de homoj en la Ajabe-centron daŭris. Nova misia fervoro, spronita de la profetaĵo pri "la urĝeco de la tempo", ricevis formon por pli disvastigi Oomoton tra Japanujo. Studentoj forlasis siajn lernejojn, multaj el ili forvendis siajn librojn, por financi la vojaĝon al Ajabe. Instruistoj, al kiuj la lernejoj aŭtoritatoj malpermesis aliĝi al la nova religio, rezignis sian karieron, por veni.

Ĉe Ajabe kun kvietaj pejzaĝo, for de la katenoj de urba ekzisto, loĝantoj travivis kristaliĝon de sia korpo kaj animo, kaj purigitaj, disiris por disvastigi la novan kredon. El taglibro de tiu tempo:


Ni lavis nian rizon per glacie malvarma akvo; ni kolektis brullignon en la arbaro sur la frosta grundo; ni sidis ĝis profunde en la

nokto, preĝante kaj farante diskutadon.

Neniu povis dubi pri la sukceso de la kampanjo. Dum apenaŭ kvin jaroj Oomoto kreskis el malpli ol milmembra grupo al tiu de pli ol tricent mil sekvantoj kun centroj en ĉiuj partoj de Japanujo. Mono komencis enflui el ĉiuj flankoj. Neriĉaj homoj, legantaj la *Ajabe-Ŝinbun* (Ajabe-Novaĵoj), faris kontribuojn. Mararmejaj personoj, ĉiam pli kritike rigardantaj la farojn de la registaro, donis financan subtenon. Vere, dekstruloj kaj militistoj en registaraj rondoj havis kaŭzon por alarmiĝo.

Por kroni la aferon, en aŭgusto de 1920, Onisaburo aĉetis vaste legatan ĵurnalon, la ĉiutagan *Taiŝō Niĉi-Niĉi* kune kun ties oficejoj en Oosaka. Tiu ĉi enmanigo de amaskomunikilo fare de religia organizo estis senekzempla kaj faris sensacion tra Japanujo. La novaj posedantoj de tiu ĉi ĵurnalo faris sian pozicion perfekte klara en la unua numero:

La nuna politika situacio en Japanujo estas regata per partieco kaj gvidata por servi al la intereso de unu sola partio. El materiisma vidpunkto, nia socio estas regata per klasbatalo. Krome, la planoj de niaj diplomatoj esence estas partikularaj kaj montras nenian longatempnan prizorgon kaj vidon al la estonteco de la mondo. Ĵurnalistoj kaj novelistoj kunkulpas en tio. Konsiderante la dekadencan de la nuntempo, Oomoto ja ne havas alian



La pordo kaj paŝoŝtonoj de tegastejo Kakuzankjo en Ajabe

elekton, ol sonorigi la alarmon. La renomaj ĵurnaloj plejparte malhavas idealojn. Rigardante la malhonestecon de la kapitalistoj, ni estas pretaj lukti kontraŭ la registaro, kontraŭ ekspluatistoj, kontraŭ superprofitistoj... Ni devas vekti la mondon pri la amplekso de ĝia danĝera situacio. Krome, imperativas plibonigi la socialajn kondiĉojn de la lando...

Kaj kvazaŭ la registaro ne havus ankoraŭ sufiĉe da zorgigaj aferoj, en 1919 Oomoto fondis sian misian centron en Tokio, la *Kakuŝin-kai* (Asocio de la Fideluloj), kiu baldaŭ altiris eminentulojn, armeajn altrangulojn, kaj eĉ membrojn rilatajn al la imperia familio. La kabinetaj ministroj reagis, ordonante eksigi el la armeaj servoj ĉiun, kiu fariĝis membro de la religio.




## REGISTARO TRUMPETAS LA ALARMON

Tiam estis la tempo, kiam oni vidis movadon de demokratiigo, kaj la registaro trovis sin premata en tre malfacila situacio ĉiufanke. Certaj grupoj unuiĝis, por akceli la abolicion de la imperiestra sistemo kaj la stariĝon de respubliko. En Majtago de 1920, la unuaj civilaj tumultoj eksplodis. Tio prezentis la okazon al la registaro por organizi vicon da frakcioj el fanatikaj dekstruloj, kaj unu el iliaj unuaj celoj estis tiu ĉi rapide kreskanta religia organizo, kiu tiel insiste vokadas, meze inter ili, por reformoj de ĉia speco kaj entute nova politika orientiĝo de la registaro.

Eĉ la pli liberala opozicia partio en la parlamento cedis al la postuloj de la reganta partio kaj manpremis kun radikalaj dekstruloj, por akceli subpremon. Fine, apogante sin sur la rezultato de serio da "enketoj", la anti-Oomoto grupo faris la oficialan proklamon:

La Oomoto-religio konsistigas danĝeron al la sekureco de nia lando kaj obstaklon por la establo de sana nacio.

La Ministro de la Enlandaj Aferoj, la Ministro de la Instruado kaj la Ministro de Justico ordonis, ke kritika okulo estu fiksita sur Oomoto kaj Onisaburo, kaj la 10an de januaro 1921, la Prokuroro eldonis sekretan ordonon transdoni Oomoton al juĝado.



## PROFETAĴO

Neniu povas dubi, ke du faktoroj kontribuantaj al la grandioza karismo de Onisaburo estis liaj ŝamanistaj kapabloj kaj lia profeta talento. Preskaŭ neniu afero kun pli-malpli grava sekvo okazis sen tio, ke iu rememoras la antaŭdiron de Onisaburo pri ĝi. Ekzemple, Onisaburo iam ordonis al laborantoj konstrui lageton ĉe Ajabe. La laborantoj komencis fosi, fosadis, sed trovis nur ŝtonojn kaj rubon. Ĉar tute ne aperis fonto aŭ ia elfluo de akvo, la laborantoj ekhavis suspekton, ke la ideo estis nur sensenca kaprico, kaj la laboro treniĝis, ne konvene por Onisaburo. Ili tamen iel povis fine pretigi tute sekan basenon kaj la projekto finiĝis — ŝajne vane. Okazis post ne longe, ke la urba konsilantaro, por fajropreventa projekto, petis permeson trakurigi akvovojon tra la grundo de Oomoto. La kanalo trapasis tra la

Aŭrora nebulo ĉirkaŭ la Banšōden-sanktejo en Kameoka

preta kavego, plenigante ĝin per akvo: jen realiĝis bela lagetito.

El ĉiuj antaŭdiroj de Onisaburo, la unua, kio altiris atenton de tutnacia amplekso, temis pri natura katastrofo okazonta en Tokio. La katastrofa tertremego, kiu alniveligis ĉion de Tokio altere en 1923, estas nun historia afero, sed siatempe la ĵurnaloj rapidis rememorigi, ke Onisaburo antaŭvidis ĝin. Ajabe, sekve de tio, estis vizitata de svarmantaj homoj, dezirantaj tributi respekton al la granda profeto.

## LA UNUA OOMOTO-AFERO EKAS

Oni ne povas diri, do, ke la surpriza atako, per kiu la registaro komencis sian persekuton al Oomoto, trafis la kredantojn tute sen averto. Nao Deguĉi jam aludis la aferon en ĝenerala maniero multloke en la *Ohu-desaki*, kaj Onisaburo antaŭdiris eĉ la tagon de la okazaĵo. Tiu tago estis la

12a de februaro 1921, kiam en la fruaj horoj de la mateno, pli ol ducent armitaj policanoj sieĝis la centron ĉe Ajabe kaj komencis traserĉon de la tuta sidejo.

Tiu ĉi elmonstro de armita forto kaj la maniero de la traserĉo, kiun la polico faris, atestas pri tio, kiel serioze la registaro prenis la fantaziajn famojn, kiujn oni cirkuligis pri Oomoto en la antaŭaj jaroj. Tiuj famoj diris, ke Oomoto havas ĉe Ajabe multajn subterajn ĉambrojn, kie pogrondaj masakroj okazas, virinoj estas seksatencataj po centoj, kaj sensciaj homoj estas magie aŭ sorĉe subigataj. Kio pli serioze maltrankviligis la registaron, estis timoj, ke Oomoto efektive estus socialista komploto, ŝajniganta sin de religio, kaj ke tiuj fifamaj keloj estus por kaŝi aron da armiloj, trejnitajn trupojn kaj grandan kason da mono — por ke ĉio estu preparita por transpreni la potencon de registaro perforte. Aparte cirkulis raporto, ke Onisaburo



La gablo de Rokuju no Jakata en Ajabe

iel enmanigis al si imperian standardon kaj ordonis ke la sekvantoj al ĝi faru omagon.

Onisaburo estis for en Oosaka, kaj laboranta en la ĵurnala oficejo kiam la surpriza atako okazis. La aliaj gvidantoj ĉe Ajabe, inkluzive de Sumiko Deguĉi, edzino de Onisaburo, estis alarmitaj de la tumulto kaj grupiĝis en unu el la ĉambroj, kiam la polico enkuris, kriante, "Vi estas kulpaj pri ŝtatperfido kaj rompo de la gazetara kodo!" La grupo povis nur rejeti rigardon, gapante.

La polico komencis traserĉi ĉiun angulon de la loĝejoj, sanktejoj, oficejoj kaj bibliotekoj. Ili ekzamenis ĉiun libron, fotojn, pentraĵojn kaj konfiskis ĉiujn dokumentojn kaj personajn leterojn de Onisaburo. Unu el la policoficiroj alpaŝis al Sumiko Deguĉi kaj demandis, kie ŝi kaŝis la imperian standardon. Ŝi povis respondi nur, "Kio imperia standardo? Ni havas ĉi

tie nur la zonskarpojn, kiujn niaj laborantinoj portas".

Malfeliĉe por la predon anticipantaj persekutantoj, ilia traserĉo ne malkovris eĉ unu pistolon nek unu kadavron, sed nur malgrandan sumon da mono. Tamen ili revenis post dek tagoj kaj denove traserĉis, ĉi-foje eĉ derompante plank-tabulojn, por enrigardi suben.

Intertempe Onisaburo, kiu estis arestita ĉe la ĵurnala oficejo en Oosaka, estis akuzita pro ŝtatperfido kaj transportita al Kioto por malliberigo. Samtempe en Ajabe, la polico arestis Ŭasaburo Asano, direktoro de la revuo *Ŝinrei-kai* (La Mondo de la Spirito), kaj Sukesada Joŝida, ĝia redaktoro kaj eldonisto. La aŭtoritatoj submetis Sumiko Deguĉi kaj okdek aliajn membrojn de la religio sub polica observado kaj al oftaj priserĉoj.

Tiamaniere komenciĝis la Unua Oomoto-Afero, daŭranta por ses jaroj. Estis okazontaj senĉesaj polica molestado, malicaj kaj kalumniatakoj fare de Ŝtat-regataj gazetoj, kripligaj restriktoj al la eldonaj kaj aliaj aktivecoj de la religio, rigida cenzuro, kaj pli. Sed la spirito de Oomoto restis multe pli firma kaj kuraĝa, ol ke tiuj koncentritaj atakoj povus ĝin paralizi. La profetaĵo plenumis sian rolon perfekte. Ĉar ĉiuj tiuj ĉi afliktegoj estis anoncitaj en la sanktaj skriboj, ili devas esti parto de la dia plano. Tio estis nur afero de kliniĝo al la Dia Volo.

Trad. T. Nakamura

## REVIVIGI LA TERON

Elizabeth Oliver

*En Japanujo, la situacio fariĝos pli malfacila ĝenerale, kaj estos manko de nutraĵo. Venos tempo, kiam eĉ unu legoma folio estos valorega. La homoj nun estas kontentaj amasigi al si oron kaj arĝenton, sed en la horo de bezono, neniu povas sin vivteni per mono. Ĉu vi ne estas avertitaj jam de 1892, ke venos tempo, kiam unu manĝeno da rizo estos pli valora ol miliono da enoj, kiam oni faros rizkampojn el moruskampoj?*  
Ohudesaki, 23. XI. 1917

Kiom da atento ni donas al manĝaĵo? En tempoj de abundo, la homoj amasigas aŭ malŝparas sian monon kaj havaĵojn, sciante ke manĝaĵo estas io facile havebla. Sed en tempoj de krizo, de milito, de senpluveco, de malsatego, manĝaĵo fariĝas pli valora ol oro.

La supre cititaj vortoj avertis la japanojn pri la danĝero de la tendenco foroferi la rizkultivadon por mongaĵoj. Moruso estas la ĉefmanĝo de la silk-raŭpo, kaj la silkokulturo siatempe faris gravan kontribuon al la plivastigo de la japanaj eksportmerkatoj.

Kiam la japanoj serĉis manĝeblaĵojn el la cindraj ruinoj post la malvenko en la dua mondmilito, eble ili komprenis ĝisoste la pravecon de tiuj vortoj. Ne estas eksvalida la sama averto hodiaŭ, kiam la evoluintaj mondpartoj ĉiam pli skuigas pro la

ondo de 'petrolŝokoj'.

En kampara regiono de Ŝiga-gubernio estas viro, kiu dediĉas sian vivon al la studo de memsufiĉa kultivoplano por manĝaĵo. Li kredas, ke per uzado de la haveblaj naturaj rimedoj ni povas kreskigi sufiĉe da nutraĵo, por transvivi ian ajn estontan krizon.

Sed gravas la maniero, kiel ni kultivas nian nutraĵon. Ne sufiĉas simple meti planton en la teron kaj atendi ke ĝi kresku kaj produkti nutraĵon. Kunihiro Ŝimamoto dum pli ol tridek jaroj faris pioniran esplaron pri la internaj funkcioj de la tero kaj rikoltis fenomenajn rezultojn. Sed antaŭ ol rigardi pli proksime lian laboron, ni mallonge konsideru la originon de la uzado de la grundo kaj la historion de la evoluo de la nuntempa agrikulturo.

En Eŭropo, agrikulturo ekis kiam la homoj ĉesigis nomadan vivon kun siaj gregoj kaj ekloĝis, unue portempe, poste daŭre, en unu loko. Ili plimalpli frue rimarkis, ke la kultivado de grenoj konstante sur la sama grundo ne prosperas, kaj ili evoluigis rotacian sistemon, laŭ kiu ĉiujare oni ripozigas unu kampon. Baldaŭ ili eltrovis ke, se ili fekundigas la kampojn per bruta sterko, ili povas utiligi la saman grundon jaro post jaro. Ili ne komprenis kial, kaj memkompreneble

la produktado estis neregula. Sed nur organikan agrikulturon ili konis kaj praktikis. Poste, kun la alveno de la Agrikultura Revolucio en la 18a jarcento, oni faris gigantajn paŝojn en la selektado kaj krucado de bestoj kaj plantoj, tiel ke nur la superaj specioj estis konservitaj kaj la malpli fortaj varioj estis forĵetitaj.

En Azio, du apartaj manieroj de grundofekundigo regis de la malnovaj tempoj. Unu estas la rezulto de la natura superfluo de la riveroj, kiuj altiĝas dum la musona sezono, inundas la teron kaj postlasas valoran ŝlimon, kiel okazas en Hindujo, Kamboĝo kaj aliaj landoj. La alia estas la uzado de sterkoj de animala, vegetala aŭ homa origino.

Ĝis la 17a jarcento en Japanujo, la kamparanoj ĉefe utiligis herbojn,

foliojn kaj cindron kolektitajn el proksimaj montoj kaj arbaroj por fekundigi siajn rizkampojn. Ĉi tio postulis grandegan kvanton da laboro, ĉar la herbojn oni devis falĉi, kolekti, transporti alvale, kaj enterigi en la kampojn antaŭ la plantado. Oni diras, ke dek labortagoj estis necesaj por prepari unu *tan* (proksimume 0,1 hektaro) por plantado.

En la sekvanta jarcento, komercaj sterkaĵoj en la formo de sekigita fiŝfaruno, olerekremento, fuko kaj homa ekskremento fariĝis popularaj, sed oni devis aĉeti ilin per mono aŭ varoj. Ĉi tiuj sterkaĵoj estis konataj de antaŭe, sed ilia uzado etendiĝis nur ĝis ĉe la vilaĝoj ĉirkaŭ grandaj urboj aŭ proksimaj al la marbordo. La disvolviĝo de enlanda transporto dum la Edo-epoko ebligis al la kamparanoj

disponi ĉi tiujn novajn komercajn sterkaĵojn, por aldoni al la tradiciaj kompoŝtoj. Kvankam unufoja rikolto jare estis regula antaŭe, nun plurfoja rikoltado fariĝis ebla, kaj la produkto-kvanto obliĝis proporcie al la kvanto da sterkaĵo uzita.

Ĝis ĉi tiu punkto, ĉiuj sterkaĵoj estis organikaj, sed la ŝvelanta ekonomia prospero de Japanujo post la dua mondmilito vidis la kreskantan uzadon kiel de kemiaĵoj, tiel ankaŭ de insekticidoj kaj herbicidoj. Dum la lastaj dudek jaroj, la grundo de ĉi tiu lando ricevadis persistan dieton el kemiaĵoj. Kompreneble, ke la kamparanoj amegis ilin. Pura polietilensako da kemia sterkaĵo ŝparigas al ili multon de la laboro, en komparo kun la penoj disporti per ĉaretoj la ekvivalentan kvanton da kompoŝto ĉirkaŭ la kampoj.

Jam satiginte la enlandan merkaton, la grandaj kemiaj kompanioj direktas sian atenton al la registaroj de malpli evoluintaj landoj, por instigi ilin aĉeti pli da sterkaĵoj. Kelkaj el la tiel nomataj "miraklaj" varioj de tritiko, aklamitaj kiel solvo por la problemo de monda malsato, estas nur maskitaj taktikoj por igi la malpli riĉajn landojn aĉeti pli da kemiaj sterkaĵoj, sen kiuj ĉi tiuj kemiajvoremaj hibridoj ne povas kreski.

Tamen, lastatempe estas rimarkebla malkresko en la uzado de kemiaj sterkaĵoj kaj revivigo de organika sterkaĵo. La kialo de tio ne estas ĉar kultivistoj rimarkis pri la danĝeroj de la troa uzado de kemiaĵoj, nek ĉar tiuj povus kaŭzi nedifineblan difekton al

tiuj, kiuj manĝas iliajn produktaĵojn, sed ĉefe, ĉar la abundaj rikoltoj de la fruaj jaroj ne plu daŭras, kaj la grundo, saturita de kemia dieto kaj perdinta humojn, fariĝis sterila.

Tio tute ne estas surpriza por Kunihiko Ŝimamoto. De antaŭ multaj jaroj li antaŭvidis ĉi tiun situacion kaj rekomendis sian propran formulon por ricevi la plejbonaĵojn de la tero, t. e. produkti plantojn ne nur sanajn, sed ankaŭ sendanĝerajn por homa manĝado. Por kompreni lian filozofion, ni esploru ĝin iom pli profunde.

*La branĉoj kaj branĉetoj de arbo ne povas vivi sen la radikoj. Sen radikoj la branĉoj, kune kun la branĉetoj, mortus. En ĉio la radiko estas grava.*

Ohudesaki, 8. I. 1902

Onisaburo Deguĉi kaj Kakuja Ŝimamoto, la patro de Kunihiko, ambaŭ kredis, ke la tero estas la origino de ĉio, kaj ankaŭ ke la radiko estas la origino de la planto. Por ricevi la plej bonan specon de planto, ni devas atenti la radikon kaj la teron ĉirkaŭ ĝi. La teron oni devas ami kaj nutri, se oni atendas el ĝi abundan rikolton.

La familio Ŝimamoto rezidis en la urbeto Minakuĉi de kiam neniu memoras. Sed ili ne estis terkulturistoj — ili servis la kastelon de Minakuĉi, kies nur ŝtonfundamento restas hodiaŭ. La avo de Kunihiko Ŝimamoto instruis ĉe agrikultura lernejo apud la bieno, sed lia filo Kakuja transloĝiĝis al Nagoja, kaj tie li starigis manĝaĵfabrikon. Antaŭ la milito, li fariĝis Oomoto kaj estis multe simpatia al la

S-ro Ŝimamoto montras specimenon de *daikon*, speco de japana rafano.



kredo de Onisaburo pri la Naturo kiel la Origino. Kiam la milito eksplodis, li decidis reiri al la hejmloko de siaj prapatroj kaj provi realigi siajn idealojn. Li ankoraŭ iradis al la fabriko en Nagoja unu fojon semajne, sed la detruigo de la fabriko pro brulbomboj konvinkis lin, ke lia vivo estas en Minakuĉi.

Ĉe la komenco, la taskoj, kiujn alfrontis la familio, estis preskaŭ nevenkeblaj. La tereno ĉirkaŭ la ekskastelo estis densa arbaro de grandaj pinoj kaj aliaj arboj. Por haki la arbojn kaj pretigi la grundon necesis pli ol unu jaro, ĉar ĉiun radikon oni devis eltiri mane, uzante nur la plej simplajn ilojn. Kunihiro Ŝimamoto konfesas, ke lia familio estis sensperta pri agrikulturaj iloj, kaj ke estas lia patrino, kiu devenas el agrikultura familio en Aiĉi-gubernio, kiu unue instruis al li kiamaniere uzi sarkilon.

Profesiaj kultivantoj emas ignori la praktikantojn de organika agrikulturo, kiel ekscentrajn amatorojn. Kaj ja estas sennombraj teorioj proponitaj en la nomo de "organika agrikulturo", kelkaj el ili kondukas en plej bona okazo al dubindaj rezultoj, aliaj havis rimarkindajn rezultojn, sed ĉiuj konsentas pri la celo produkti tute sanajn, senkemiajn nutraĵojn.

Kunihiro Ŝimamoto pretendas ke li estas amatora farmisto, sed kiu vizitis lian kulturbienon kaj vidis liajn freŝkreskantajn legomojn, neniu serioze prenis lin por 'amatoro'. Li ja estas amatoro en la senco, ke li memvole povis decidi sian vivon dediĉi al la studo pri la grundo kaj la vivo de

plantoj, malkiel la plimulto da kamparanoj, kiuj heredas bienon kaj nur devas plugi ĝin, aŭ luigi ĝin al iu, kiu povas.

Al tiuj, kiuj mem kultivas legomojn, aŭ kiuj kutimas bone rigardi najbarajn legomojn, aŭ eĉ al la neprofesiulaj okuloj evidentas, ke la produktoj de Minakuĉi estas eminente elstaraj. Ne nur grandaj laŭforme kaj foliriĉaj, ili havas nenian signon de la malsanoj, kiujn ofte kaŭzas insektoj kaj fungoj ĉe la organike kultivataj legomoj. Kvankam kultivataj en la sama grundo jaro post jaro, ili restas rimarkinde difektimunaj. Kunihiro Ŝimamoto klarigas, kiel li atingis tiajn rezultojn. La vera kaŭzo de malsanoj ne estas insektoj kaj fungoj — ĉi tiuj invadas kaj multobliĝas sur netaŭgaj varioj

kaj legomoj malbone kultivataj. Por eviti malsanon, do, necesas bonteni sanajn plantojn en la optimumaj kondiĉoj por kreskado.

*Agrikulturo estas la fundamento de statistiko*

*Kompoŝto estas la fundamento de agrikulturo*


*Fermentado estas la fundamento de kompoŝto*

La tero estas la vivantejo de mikroorganismoj, insektoj, lumbrigoj, bakterioj, fungoj, gistoj kaj enzimoj, kiuj interagas unuj la aliajn por malkombini la organikajn substancojn en la tero ĉirkaŭ si. Preskaŭ kian ajn parcelon oni povas transformi en riĉan, produktivan medion per stimulado al la plej

aktivaj elementoj ke ili faru sian laboron. Enzimoj kaj gistoj estas la plej gravaj kataliziloj en la tero-kemio, sed por ke ili eklaboru, ili bezonas akvon, aeron kaj certan gradon de varmo.

Plej multaj organikaj sterkoj, ĉu homaj, animalaj aŭ vegetalaj, ne nur bezonas longan tempon por malkombiniĝi, sed ankaŭ distribuas malutilajn organikajn acidojn, kiuj difektas kaj la teron kaj la kultivaĵojn. Kruda sterko enmetita en la tero putras malrapide, ellasante odoraĉon. Estas abisma diferenco inter putrado kaj malkombiniĝo pro fermentado. Manpleno da tero, hazarde forprenita el la kulturteroj de Minakuĉi, ellasas dolĉan odoron, tute ne putrecan. La bazo de vivanta tero kuŝas en la kompoŝto, kaj pri la produktado de kompoŝto Kunihiro Ŝimamoto faris siajn plej gravajn pionirajn esplorojn.

Antaŭ ĉirkaŭ 15 jaroj, la Ŝimamoto-Instituto por la Studo de Mikroboj fondiĝis, kune kun fabriko por la produktado de kompoŝto bazita sur fermentado, komerce vendata sub la nomo "Bime Food". La kompanio kreskis (nun estas fabriko ankaŭ en Tajvano), kaj multaj personoj komencis studi kaj apliki la metodojn de Ŝimamoto en siaj propraj kampoj. Studantoj ĉe la Instituto kutime restas dum unu jaro, kaj 4-taga seminario okazas du fojojn jare, en januaro kaj aŭgusto. Okazaj vizitantoj kaj abonantoj de la ĉiumonata novajletero, eldonata de la Instituto, venas de ĉiuj partoj de Japanujo: dum la pasintaj dek jaroj ili nombris pli ol dek unu mil.



Kompoŝtostako estas turnata

ĉiun dekkvinan tagon.





S-ro Ŝimamoto kaj f-ino Elizabeth Oliver ĉe la laktuko-kultivejo

Dommastrinoj, kiuj iom post iom komencas ŝati senkemiaĵajn, freŝgustajn legomojn, vizitas en grupoj, kaj reiras hejmen, portante la malavaraĵajn legomdonacojn de s-ro Ŝimamoto. Superflujaj legomoj estas vendataj al grupoj de la konsumantoj en Oosaka, sed la oferto neniam sufiĉas por la mendoj.

En regiono fama pro sia verda teo, la tearbedoj de Minakuĉi ripete gajnis la gubernian premion por la plej bona teo, kaj en Ŝiga — konsiderata iom tro malvarma — oranĝoj produktiĝas nur en Minakuĉi.

La fabriko kaj la domo staras unu apud la alia — la domo konstruita en klasika japana stilo kun Oomoto-altaro por familia adoro. Ĉie penetras laodoro de gisto, iom kiel en bakejo en frua mateno. La formulo por la procedo de enzim-gista fermentado kom-

preneble estas sigelita sekreto, sed la manieron, laŭ kiu la kompoŝto estas farata, oni povas vidi ĉe la Instituto. Vegetala forĵetaĵo aŭ animala sterko estas uzebla kiel la bazo, sed la baza formulo ĉe Minakuĉi estas proksimume laŭ la jenaj proporcioj:

|                   |      |
|-------------------|------|
| rabotaĵo          | 50%  |
| seĝaĵo            | 20%  |
| kortobirda sterko | 15%  |
| rizbrano          | 1,7% |

kun plimalgrandaj kvantoj da ostopulvoro, fiŝfaruno, olefeĉo, forĵetitaj legomfolioj kaj signeta 0,1% da "Bime Food". Al la tuto oni aldonas 60% per volumeno da akvo.

Ĉi tiuj materialoj de kompoŝto estas sternitaj en la blokitaĵoj tavoloj de skatolformaj strukturoj kaj surŝprucigitaj per akvo kaj lasitaj por fermenti

tado dum 24 — 48 horoj, laŭ la sezono, ĝis la centro de la stako atingas 60°C. La stakon oni turnas ĉiun 15an tagon por ebligi aeradon, dum filtritan likvaĵon oni repumpas sur la surfacon. Post 2 — 3 monatoj la kompoŝto estas preta por uzi sur la kampoj.

Aliaj formuloj entenas bestkortan sterkon, verdan herbon, aŭ pajlon anstataŭ rabotaĵo, aŭ egalproportcian kombinaĵon de unu el la supraj kun ordinara tero. Kompreneble, diversaj legomoj kaj diversaj kondiĉoj postulas diversajn formulojn, sed la baza principo estas atingi kompletan fermentadon per instigado al la aktiveco de enzimoj kaj gistoj, kunhelpe de aerado kaj akvo.

Nenio precipe revolucia estas en ĉi tiuj procedoj — finfine, la naturo certigis al si sian kontinuecon per memfekundigo ĝis nun, tute sen homa

helpo. Dum milionoj da jaroj, de la siberiaj tundroj ĝis la ĝangaloj de Brazilo, la folioj kaj arboj faladis teren kaj fine intermiksiĝis nedistingeble kiel parto de la tero mem. Hufuloj, pro sia memkonserva instinkto, kutimas ne formangi la tutan herbon en iu loko, sed iras aliloken, lasante iom por la venonta fojo. Dum ili vagadas, la herbosemoj alkruciĝintaj al iliaj hufoj falas teren, kie ili ekĝermas kaj fariĝas furaĝo por la estonteco.

Homoj kreis artefaritan medion kaj pli kaj pli eltrudas de la rezervo de la naturo. Sed por povi transvivi ni devas replenigi ilin tiom, kiom ni foruzas. Ni devas redoni en la teron, kion ni forprenas.

Kunihiko Ŝimamoto montras al ni ekzemplon.

— Trad. C. Rowe

#### *Kabura, speco de japana rapo*



## Intervjuo kun s-ro Stefan Maul

S-ro Stefan Maul naskiĝis en Jugoslavio en 1940. Li studis teologion kaj ĵurnalismon en Germanujo, kaj magistriĝis pri katolika teologio. Li nun estas respondeculo pri politikaj kaj religiaj aferoj ĉe la sudgermana ĵurnalo Schwabischer Zeitung kaj ĉefredaktoro de la internacia esperanta gazeto MONATO. Dum sia unua vizito en Japanujo, de la 16a ĝis la 25a de januaro, s-ro Maul prelegis en la urboj Tokio, Jokohama, Hiroŝima, Oosaka, Hukuoka kaj Nagoja.

La 21an de jan., li venis al nia Centro en Kameoka, kie li renkontiĝis kun Oomotanaj esperantistoj, rigardis dokumentajn filmojn pri la Oomoto-Lernejo de Tradiciaj Japanaj Artoj kaj pri nia komuna adoro kun la Katedralo de S-ta Johano, Nov-Jorko, kaj prelegis pri la pozicio de Okcidenta Germanujo en la hodiaŭa mondo. Dum sia restado ĉe ni, s-ro Maul komplezis al ni per jena intervjuo.

*Hodiaŭ al Oomoto ni havas la ĝojon akcepti s-ron Stefan Maul el Germanio, kaj do por ne perdi longan tempon ni simple bonvenigas vin. Vi ĵus havis la okazon rigardi niajn du filmojn. Ĉu vi bonvolus komenci per viaj impresoj pri tiuj filmoj?*

Mi komencu per la dua filmo. Ĝi tre forte impresis min, eble pro tio, ke similan eventon kaj similan atmosferon mi antaŭ nur kelkaj monatoj travivis en Germanio, kiam la Papo vizitis la landon. Unu el la celoj de lia vizito estis konatiĝi kun la lando, en kiu naskiĝis Martin Luther, kiu estis, por tiel diri, la patro de la Protestantismo. Vi scias, ke en la Kristanismo estas du grandaj skismoj, unu inter la Katolika

kaj Ortodoksa Eklezioj, kaj la alia inter la Katolika kaj Protestanta Eklezioj. Apartiĝo de la Protestantismo estas precipe grava en mia lando, unue, ĉar ĝi tie naskiĝis, kaj due, ĉar tie jam de multaj jaroj oni klopodas multe pli, ol en la aliaj landoj, pri reunuiĝo, eble ĝuste pro tio, ke ĝi estas la naskiĝlando de tiu skismo.

Martin Luther siatempe pilgrimis al Romo por vidi la metropolon de la Katolikismo, de la Kristanismo tiama, kaj revenis kun vere malbona impresoj pri la tiama centro de Katolikismo, kie la ofico de la Papo estis grandparte misuzata pro nepotismo, financaj aferoj, k. t. p. Kaj el tiu sperto Luther venis al diversaj radikalaj ideoj pri Kristanismo, kaj iom post iom el tio

kreskis la Protestantismo. Kaj nun tiu Papo, ne la sama Papo, kontraŭ kiu ribelis la tiama Germanio, sed la hodiaŭa oficanto de tiu papeco, venis, kiel li diris, ankaŭ kiel pilgrimanto, kaj renkontiĝis, en Mainz, tre historia urbo ankaŭ en tiu rilato, kun la 'heredantoj de Luther', nome la reprezentantoj de la Protestanta Eklezio en Germanio. Tiu renkontiĝo ankaŭ povas esti nomata, eble sankta, ĉiukaze historia, renkontiĝo.

Mi ĉeestis kiel ĵurnalisto en tiu vojaĝo de la Papo, kaj tie ekestis ankaŭ tre grava spirito kaj etoso de amikiĝo inter tiuj du eklezioj. Pro tio mi tre bone komprenas, kiel grava estas ĉi tiu evento por Oomoto kaj la Episkopa Eklezio. Dum tiu vojaĝo de

la Papo, tio estis la renkontiĝo ne sole inter la du eklezioj, sed estis multaj tiaj okazoj, kiel la via, kaj li ĉiam emfazis, ke li venis por renkonti ankaŭ la nekatolikajn kristanojn en tiu lando. Efektive la tuta popolo tre bonkore akceptis lin, kaj reciproke. Do estas mia opinio ke, kiel ĉe vi, tio estas bona komenco interamikiĝi kun alia religio, kaj kiel okazis en Germanio nun, tio devas daŭri kaj plu evolui, kaj la ŝanco evidente ekzistas por tio.

Tio estas pri la dua filmo, kiun mi vidis, kaj mi tuj volas daŭrigi pri la unua. En Eŭropo la Kristanismo estas la ĉefa religio, tamen multaj homoj en Eŭropo ne plu fervore sekvas sian religion, ĉefe la plenkreskuloj, kaj pro tio ankaŭ la infanoj ne tiel fervore



emas al religio en la lastaj jaroj. Sed nun ŝajnas, ke la junularo en Eŭropo rimarkis, ke tamen io grava mankas en ilia vivo. Krome, post diversaj ŝajne nur formalaj reformoj en la Kristanaj eklezioj, iel foriĝis certa etoso, certa atmosfero, kiu kaptas la koron de la homoj. La eŭropanoj estas tre racieman homoj kaj strange ili enkondukis tiun racion ankaŭ en la religion, kie, laŭ mia opinio, ĝi ne devas havi lokon. Pro tio la diservoj en la lastaj jaroj evidente ne plu atingas la korojn de la junularo, kaj la junularo en Eŭropo nun serĉas tiun perditan korecon. Oni faras tion diversmaniere, ekzemple, oni aranĝas siajn proprajn kunvenojn, en kiuj oni kantas kaj ludas kaj dancas k. t. p., kio ne estas kutima en la kristanaj eklezioj, kvankam tia kutimo ja ekzistis en la mezepoko. Mi vidis en via sanktejo tiun scenejon, kie oni prezentas no-dramojn — tian oni havis ankaŭ en Kristanismo en la mezepoko, sed hodiaŭ tute ne. Tiaj aferoj mankas, kaj la junularo serĉas kaj serĉas ĉie, ankaŭ en la aziaj religioj. Kaj ankaŭ en tio mi vidas grandan ŝancon por interreligia interkompreniĝo, kaj tio certe ankaŭ povus konduki al pli granda paco en la homaro. Do tio momente pri miaj impresoj pri tiuj du filmoj, kiujn mi vidis.

*Ĉu la vizito de la Papo en Germanio estis longedaŭra aŭ kelktaga?*

Fakte ĝi estis nur kelktaga — se mi ĝuste memoras, estis kvin tagoj. Kaj dum tiuj kvin tagoj li, laŭ sia propra intenco, vizitis gravajn his-

toriajn lokojn, kiuj rilatas al la religio. Ekzemple, li estis en nordgermana urbo Osnabrück, en kiu urbo la kristanoj de ambaŭ eklezioj, malgraŭ la reformacio, ĉiam kuniris tre bone. Li intence elektis tiajn lokojn por demonstri sian intencon.

Li ĉiam havas certajn celojn ĉe siaj vizitoj, kaj mi el mia propra sperto povas diri, ke tiu homo estas vere karisma homo, ne ĉar li estas Papo — tio estas feliĉa hazardo, aŭ gvido de dia providenco, kiel vi volas — sed ĉiuokaze impresas tiu homo simple pro la fakto ke li estas vere sincera, honesta homo. Kaj oni tuj kredas tion, kion li diras, ĉar oni rimarkas, ke li ne diras tion pro propagando, kiel faras politikisto, kiu eble estas bona oratoro. Sed lia parolo venas el la koro, kaj oni rimarkas tion. Ankaŭ tio ŝajnas al mi bonŝanco en la nuna situacio, ke ni havas tian papon, ĉar en la lastaj jaroj la rilatoj inter la eklezioj kaj religioj iomete ja malboniĝis laŭ mia observo. Se li nun venos al Japanio, tio tutcerte ankaŭ estas el la sama intenco aŭ simila intenco, ke li volas viziti ankaŭ tiujn landojn, kie estas tute aliaj religioj, kaj konatiĝi kun la homoj tie kaj kun la religioj.

Do ankaŭ sur pli alta nivelo kaj pli vasta horizonto li evidente volas antaŭenigi tiun kunigon de la homaro, pere de religio kompreneble, ĉar li estas tre religia homo. Tial mi atendas, ke ankaŭ en Japanio ni havos post tiu vizito tre interesajn rezultojn.

*Majstro Onisaburo Deguĉi enkondukis Esperanton en la organizaĵon Oo-*

*moto antaŭ preskaŭ 60 jaroj, kaj en tiu tempo li ankaŭ iniciatis la ekumenan movadon inter religioj, kaj tial mi ŝatus demandi vin, kian rolon povus havi religio en la Esperanto-movado, kiu havas sian propran idealon, kaj inverse kian rolon Esperanto povus havi en la religio, kiu ankaŭ havas siajn proprajn idealojn. Kian opinion vi havas pri tio?*

La Esperantistoj inter si scias, ke

Zamenhof mem havis certajn religiajn ideojn. Kaj tiujn religiajn ideojn li flegis aparte de Esperanto mem, tamen laŭ mia kompreno ili ne estas apartigeblaj en strikta senco, ĉar fakte en la Esperanto-movado kaj en la religiaj movadoj, entute enestas ja tiu forta intenco kunigi la homojn kaj servi al la paco, kaj ĉiuj religioj ĉefe servas al la paco, kaj volas servi al la paco. Kaj pro tio mi opinias, ke efektive la Esperanto-movado iomete kulpas, ke

### *Japania Manlingva Vortaro de Surdmutuloj aperis en la Internacia Jaro de Handikapitoj*

Lastatempe aperis la unua “Japania Manlingva Vortaro”. Ĝi entenas 863 vortojn, kun la etimologia klarigo pri la vortoj kaj la ekzercoj de vortuzado, ilustritaj per preskaŭ du mil fotoj.

La aŭtoro estas s-ino Humi Kaneda, kiu studis psikologion ĉe Ŭaseda-Universitato kaj, postmilito, instruas ĉe la surdul-lernejo de Niigata. De multaj jaroj ŝi dediĉas sin al la edukado de surdmutuloj.

Kvankam la manlingvo ankoraŭ ne estas oficiale enkondukita en la japanan edukan sistemon, ĝi estas praktike uzata en la ĉiutaga vivo de la surdmutuloj ne nur inter si solaj, sed ankaŭ kun la koncernatoj kaj volontuloj, kiuj scipovas ĝin. Ili sufiĉe efike interparolas per rapida interŝanĝo de manaj vortoj.

S-ino Kaneda diras, “Oni ofte preteratentas la fakton, ke la manlingvo plus liplegado faras sin tre efika interkomunikilo, kaj la japana ministrejo de instruado devas adopti

ĝin por la edukado de la surdmutuloj”.

Kiel la nacilingvo, tiel ankaŭ la manlingvo havas certajn dialektojn: la formoj kaj simboloj de certaj vortoj (man- kaj fingrosignoj) iom varias de loko al loko, ĉar ili radikas en regionaj moroj kaj gestoj. S-ino Kaneda kolektis ĉiujn tiujn dialektojn kaj elektis el inter ili la logikajn kiel normajn, kaj pretigis la manuskriptojn jam antaŭ dudek jaroj. Siatempe, ili estis redaktitaj kaj presitaj en la formo de “Japania Manlingva Bildaro” ĉe la Laboratorio de Eduka Psikologio, Ŭaseda-Universitato, sed ĝi ne estis por vendo al publiko. El la konstanta plibonigado de tiu Bildaro kiel bazo fariĝis la nova “Japania Manlingva Vortaro”. Oni alte taksas ĝin kiel la unuan leksikonon de la lingvo de la japanaj surdmutuloj. (Eldono de Librejo Hikari-Syobō, Tokio. Formato 21 x 29.6 cm. 320 paĝoj. 5800 enoj.)

T. Agou



ĝi ne pli forte sekvas tiun ideon de Zamenhof, kaj ke oni tro malforte ligas ambaŭ vojojn al pli granda paco, nome tiun de interlingvo kaj tiun de religio.

Mi povas imagi, ke tia movado, kia estas Oomoto, kiu dekomence adoptis tiun duan vojon, povus esti pli forta puŝanto por ambaŭ, ke Oomoto povus kaj eble devus antaŭenigi ambaŭ, uzante Esperanton pli forte ol ĝi faras nun. Kaj inverse per Esperanto pli forte disvastigi tiun ideon de tutmonda interreligia ekumeno. Kaj mi kredas, ke vi en Oomoto havas tiun ŝancon. Vidu ankaŭ, ke Radio Vatikana elsendas ankaŭ Esperanto-programon. La Katolika Eklezio nenion faras por aŭ per Esperanto. Tio estas tro malmulta laŭ mia imago, ĉar mi opinias, ke nun la Esperanto-movado atingis certan turnopunkton. Ĝis nun oni devis evoluigi la lingvon sur la literatura kampo k. t. p.; tion oni bone faris. Oni hodiaŭ havas en Esperanto vere bonegan instrumenton por ĉiuj homoj, sed nun la venonta fazo devas esti, laŭ mi, vere utiligi ĉi tiun instrumenton por ĉiuj homoj, kaj ne nur por la kelk-mil movadanoj, vere klopodi enkonduki ĝin en ĉiujn sferojn de la vivo, de la praktika ĉiutaga vivo, ĝis religio. Se la Esperanto-movado ne sukcesos fari tion, mi kredas ke ĝi ne antaŭeniros. Tial ni lanĉis la revuon *Monato*. Sur tute alia kampo ol Oomoto, ni klopodas uzi Esperanton tute praktike. Ekzistas multaj kampoj, sur kiuj oni devas simple utiligi la lingvon, kaj ne nur daŭre paroli pri ĝi. Do, mi opinias, ke pro tio interreligia kunlaboro, interreligia

konatiĝo kaj Esperanto estas fakte partneroj. Unu apartenas al la alia, ĉar per Esperanto ni multe pli facile kaj multe pli rapide povas atingi tiun interkonatiĝon, ol per iu ajn nacia lingvo, kiu estas ligita al iu kulturo kaj al iu religio. Kiu alia lingvo povus ludi pli bonan rolon de ponto por tiu interreligia renkontiĝo, ol Esperanto? Tio estas mia opinio pri tio.

*Oomoto nun aktivigas por interŝanĝo kun aliaj religioj, precipe kun la Episkopa kaj Anglikana Eklezioj. En la lasta jaro grupo da Oomotanoj veturis al Usono kaj poste al Anglujo por prezenti en tiuj du lokoj no-dramon, kaj responde al tio en la lasta aŭtuno vizitis al tiu ĉi centro Dekano de Waal el Canterbury. Ĉi tiuj interreligiaj aktivecoj komenciĝis antaŭ kelkaj jaroj kaj daŭras konstante. Kiel vi taksas tian aktivecon de Oomoto?*

Kompreneble estas tre bona afero. Sed se vi restas ĉe unu kristana eklezio kaj ne volas plivastigi vian aktivecon, tiam laŭ mia opinio estas tro malmulte. Kion mi atendus de movado, kia estas Oomoto, estus, ke ĝi klopodu pli kaj pli konvinki ĉiujn religiojn, ke ili almenaŭ interŝanĝu, kaj ankaŭ komune agu. Kiel oni havas en la protestantaj eklezioj, ekzemple la Ekumenan Konsilantaron, en kiu estas membroj el ĉiuj protestantaj eklezioj, kial oni ne povus havi ion similan por ĉiuj religioj? Kiam tia instanco, kiu reprezentus ĉiujn religiojn de la mondo, kiam tia instanco parolus, tiam ĝia eldiro havus grandan gravecon ankaŭ por tiuj,

kiuj decidas pri la sorto de la homaro, nome la politikistoj.

Se la Papo, ekzemple, venas al la U. N. en Nov-Jorko kaj faras grandiozan paroladon, tio momente ege impresas, sed tamen, li estas unu reprezentanto de unu religio, kaj eĉ ne de la tuta Kristanismo, sed nur de parto. Se ni havus similan instancon kiel la U. N. sur religia nivelo, ĝi havus multe pli gravan voĉon por la tuta homaro, kaj pro tio mi opinias, ke Oomoto devus iri al tiu celo, ĉar ĝi estas kvazaŭ destinita por tio, kaj la aliaj religioj ne, almenaŭ ne en tia alta grado, ĉar ili ne celas al interreligia agado, sed ili ĉefe vidas sin mem. Do oni devos konvinki ilin ke entute io tia, kia estas religia instanco de la mondo, havas sencon. Sed mi povas imagi ke oni vidus sencon en tia afero. Mi esperas, ke Oomoto iom post iom klopodos por tio, ĉar mi opinias, ke tio estus treege bona afero por la homaro.

*Kian signifon povus havi la vizito de la Papo al Japanujo, kiu vizito ŝajnas esti la unua al orienta lando?*

Certe, lia mesaĝo estas ĉiam paco. Tio estas unu el liaj ĉefaj ideoj. Ĉiuj lastaj papoj ĉiam tre forte insistis pri la temo paco. Kaj ĉiu havis apartan aspekton, kaj la nuna papo treege akcentas la gravecon de homaj rajtoj en rilato al paco, ĉar li diras, laŭ mia opinio, prave, ke kie oni lezas, vundas, malatentas, mistraktas la homajn rajtojn, tie ne povas esti paco. Tio estas nova aspekto de la diskutado pri paco — antaŭe oni nur diris, ke oni bezonas

justecon kaj egalecon en ekonomiaj rilatoj k. t. p. Sed li fakte reiras, laŭ mia kompreno, al la fundamento de la homaro, nome al la homo mem, kaj diras, ke kie eĉ nur unu homo estas persekutata pro ia konvinko, ekzemple religia (tion li ĉiam ankaŭ aldonas), tie ne povas esti paco. Tiun aspekton de la homaj rajtoj kaj de religia libereco li sendube kunportis el sia hejmlando, Pollando, kies popolo estas treege pia kaj religia, tamen kiu suferas pro la komunismo en tiu lando, kiel la tuta orienta Eŭropo. Estis eble ankaŭ providenco, ke ĝuste el tiu lando ni havas nun la papon, kiu havas proprajn spertojn por kompreni, kion signifas ne havi religian liberecon. Verŝajne ankaŭ pro tio li tiel volonte iras al ĉiuj kontinentoj kaj ĉiuj landoj, ĉar li havas tiun ideon pri la kunlaboro de ĉiuj homoj en la tuta mondo sur religia bazo. Mi povas imagi, ke li tion klarigos al la junuloj, kiujn li renkontos en Tokio. Tio verŝajne estas unu el la celoj de lia vizito al Japanio.

*Por la unua fojo vi nun vizitas Japanion. Kiajn impresojn vi havas de tiu ĉi vizito, kaj ankaŭ de via vizito al Oomoto? Precipe, pri la diferenco, kiun vi sentis inter la opinio, kiun vi havis en Germanio kaj la realo, kiun vi spertis post la alveno en Japanio, kaj ankaŭ rilate Oomoton, pri kiu vi legis en la revuo.*

Kompreneble oni scias, ke en Japanio estas multaj homoj. Oni scias, ke ili estas kutime afablaj, tamen mia



unua tre forta impreso estis la ekstrema kaj eksterordinara afableco de la japanoj, kiun oni tute ne konas en Eŭropo. Laŭ mia ĝisnuna sperto tiu afableco ŝajne venas el iu interna harmonio de la japana popolo, kiu denove verŝajne devenas ankaŭ de la vivcirkonstancoj, almenaŭ parte, ĉar mi vizitis diversajn loĝejojn de japanoj. Mi ne povas imagi, ke eŭropano povus vivi en tia mallarĝa loĝejo. Popolo, kiu loĝas tiel, povas elteni tian vivon nur, se ĝi havas veran fortan deziron kaj talenton vivi harmonie. Tio estas mia dua tre forta impreso, ke ĉi tie regas eksterordinara harmonio kompare al Eŭropo. Tion oni vidas ankaŭ en la ĉiutaga vivo sur la stratoj, en la trajnoj, k. t. p. Neniu ribelas kontraŭ ĝenajoj, neniu insultas iun alian, ĉiuj tre afable traktas unu la alian.

La alia tre forta impreso estas, ke estas tiel multaj japanoj en Japanio (rido). Tiuj homamasoj por ni estas absolute nekutimaj, ĉu ne. Kiam mi rigardis la urbon de Tokio de la aviadilo, mi de la komenco de la horizonto ĝis la fino vidis nur dometojn. Mi ne povis imagi, ke ĝi estas tiel giganta.

Jam antaŭ mia vojaĝo mi legis iomete pri la historio de Oomoto, mi havis certan imagon, kaj fakte tiu imago konfirmiĝis ĉi tie. Mi trovas ke ĉi tie oni vere havas trankvilan centron por spirite trovi sin mem. Io simila ja ekzistas ankoraŭ ankaŭ en Kristanismo, nome en certaj monaĥejoj, kiuj flegas meditadojn, la artojn, k. t. p. Do por mi ne estas tute nova sperto.

*Kiajn esperojn aŭ ambiciojn vi havas*

*en via propra laboro, via profesia vivo kaj via persona vivo kiel kristano?*

En Eŭropo, kiel vi scias, la ĉiutaga vivo estas sufiĉe streĉa. Mi en mia profesio ankaŭ estas sufiĉe streĉata, ĉar mi laboras kiel ĵurnalisto en tag-ĵurnalo. Tie mi ne havas grandan perspektivon, sed mi havas simplan perspektivon ke per laboro, kiu plaĉas al mi, mi povas vivteni min kaj mian familion. Sed por mi ĉiam dum mia ĝisnuna vivo pli gravas la familio ol la laboro, ĉar en la laboro certe oni povas trovi parton de kontentiĝo, sed tamen ne la tuton. Ĝin mi povas trovi en mia familio. Mia familio estas sufiĉe harmonia kaj feliĉa, kaj mi esperas ke tio daŭros kaj eĉ pliboniĝos kaj ke nia familio travivos ankoraŭ multajn jarojn de harmonia, agrabla vivo.

Sed alia faktoro en mia vivo estas Esperanto, ne tiel, ke mi nun nepre estas aktiva movadano, sed ke mi ĉiam klopodas uzi Esperanton por certaj celoj, ekzemple, antaŭe ni parolis pri ekumenismo — tio ankaŭ estas unu el miaj deziroj. Kiel studento, mi eldonis *Kristana Ekumeno*, kiu estis cirkulero por fakuloj por antaŭenigi, per Esperanto, tiun ideon, kaj poste la komuna kongreso de katolikaj kaj protestantaj esperantistoj rezultis el tiu nia klopodo. Simile mi nun klopodas per *Monato* ankaŭ antaŭenigi la interkonatiĝon de la popoloj, sur la plej diversaj kampoj, sed ankaŭ kompreneble kun tiu certa celo, kiu eble havas sian fundamenton en religio. Mi esperas ke tiun laboron, kiun mi pli multe ŝatas ol tiu, per kiu mi ricevas mian salajron, mi almenaŭ

## Karmemore

A. M. E. (Anna Magdalena Elizabeth) van Schalkwyk  
10. 5. 1912 — 28. 1. 1981

*En ĉio ame,  
patrino mirhe boa.  
Meĉu senflame,  
nun, post jaroj da solo  
pro edza fuŝviv  
kaj la milda parolo  
de manoj, buŝo,  
kiuj ĉion balzame  
flegis malvunda.  
Dum inservuto, ame...  
Trans la angoro,  
trans pen, ripozu tamen,  
vi kara koro,  
tuŝinte ĉion ame  
kaj preter redon.  
Pliriĉiga tenero,  
ter en la tero.*

30. 1. 1981

## Pluenemo

*La homo estas  
anhelo kaj stertoro  
por pretervivi,  
en vort aŭ iugeste,  
korpon kiel memoro.*

13. 2. 1981

Edwin de Kock (Sud-Afriko)

ĝis mia vivfino povos fruktodone fari.

*Kian perspektivon vi havas pri via  
gazeto?*

Kompreneble unue montri, ke per Esperanto oni povas utile labori. Ĉar mi opinias ke en la Esperanto-movado ekzistas multaj kaŝitaj talentoj, kiuj nur atendas eblecon esprimi sin. En

*Monato* ili havas tiun eblecon, kaj fervore uzas ĝin, tiel ke mi jam hodiaŭ povus eldoni semajnan revuon, sen iu ajn problemo, mi ricevas tiom da manuskriptoj. Sed ni ne havas la eblecon facile atingi tiujn homojn, kiuj eble abonus la revuon, se ili sciis pri ĝia ekzisto. Ni nun havas la eblecon varbi interne de la Esperanto-movado, sed la homoj, kiuj aktivis en la Esperanto-movado, ne nepre deziras tian gazeton, ili deziras ĉefe legi pri Esperanto mem. Dume la aliaj, kiuj lernis Esperanton, sed ne estas aktivaj movadanoj, ja verŝajne tre volonte abonus tian revuon, sed iliajn adresojn ni ne havas. Pro tio estas treege malfacile diri kiel evoluos la revuo. Ni esperas ke post kelkaj jaroj ni havos la eldonkvanton de ĉirkaŭ 5,000 kaj tio signifos ke tiam la revuo tre bone prosperos.

*Rilate al la ekonomiaj konfliktoj inter Japanio kaj eŭropaj landoj, inkluzive Germanion, kie ankaŭ ŝajnas ke oni emas limigi la importadon de japanaj aŭtomobiloj kaj okazas konflikto ekonomia, kaj oni diras samtempe ke necesas ankaŭ kultura interkompreniĝo inter Japanio kaj tiuj eŭropaj landoj, — ĉu vi havas iajn opiniojn rilate al tia problem?*

Kiel mi klarigas en mia prelego, ĉi tiu konflikto grandparte temas pri psikologiaj baroj. La ekonomiaj faktoj estas sufiĉe simplaj. Estas la psikologio malantaŭ tiuj faktoj, kiuj kaŭzas la problemon. Vi aludas, ke oni limigas importojn de japanaj aŭtomobiloj. Tion oni ja faras en Francio kaj Italio,

kaj nun ŝajne ankaŭ oni volas fari en Usono. Sed nepre ne en Germanio, ĉar la germana ekonomika filozofio malpermesas tion. Ĝi estas tielnomata libera sociala merkato, simple pro tio ke Germanio devas, se ĝi volas resti sur sia nivelo, eksporti por povi denove importi. Pro tio la plej forta kontraŭanto de protektismo kontraŭ Japanio estas Okcidenta Germanio en la Eŭropa Komunumo. Feliĉe aŭ malfeliĉe, en la Eŭropa Komunumo oni devas havi unuaniman decidon, alie ĝi ne funkcias. Do la unuopaj landoj povas parte enkonduki protektismon, sed la Eŭropa Komunumo kiel tuto ne povas fari tion, ĉar Germanio ĉiam kontraŭas. Tio estas nur por ke oni ne miskomprenu. Rilate la kulturen interesanĝon, mi tute konsentas, ke tio estas ege necesa. Nun nia internacia informsystemo estas bedaŭrinde tia, ke ni havas tre fortan usonan monopolon. Ĉiuj gravaj internaciaj informagentejoj estas usonaj, kaj tion en Germanio ni ankaŭ devas akcepti, ĉar de ili ni grandparte ankaŭ ricevas niajn informojn. La germana informagentejo ne estas sufiĉe forta por havi siajn proprajn korespondantojn en la tuta mondo. Do ni aĉetas informojn de la usonaj informagentejoj. Tio signifas ke pri la tuta Azio kaj ankaŭ pri Japanio grandparte ni ekscias per la okuloj de usonanoj. Ni en Eŭropo estas entute tre malbone informataj. Eĉ la propraj eksterlandaj korespondantoj, kiujn havas ĵurnaloj, ne raportas el tiuj landoj, kiel Japanio, ion alian ol sensacian novaĵon. Ili tute ne, ĝis antaŭ kelka tempo, raportis pri

Bernard Golden (Hungarujo)

## Deserto en la Dezerto

Laŭ la taksado pri la lernebleco de Esperanto, kiun faris du fakuloj, d-ro István Szerdahelyi kaj Prof. d-ro Helmar Frank, la Internacia Lingvo estas nur 20 aŭ 30 procentojn pli facila ol etnolingvoj. Tiu ŝajne hereza aserto kontraŭdiras la ĉefpunkton de la verdlingva propagando dum naŭ jardekoj. Nu, eble la cititaj ciferoj ne estas precize ĝustaj, sed esperantologoj kaj instruantoj de nia lingvo ne povas nei, ke ekzistas pluraj malfacilaĵoj en la gramatiko, kiujn lernantoj sukcesas enkapigi nur post granda fortostreĉo. Kelkaj tiuj malfacilaĵoj similas al gramatikaĵoj en etnolingvoj, kiuj estas stumbligiloj por lernantoj de tiuj lingvoj. En tiu ĉi artikolo mi ilustras tion per kvaropo da Esperantaj vortoj nomataj paronimoj.

Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV), paronimo estas “vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama (ekz.: pesi-pezi).” La ekzemplofrazo sekvanta la difinon tekstas: “en Esperanto la paronimoj estas principe evitindaj, krom se iliaj sencoj estas tre malsamaj.” Mi provos demonstri, ke la paronimoj en Esperanto estas ĉiukaze evitendaj! Mi pritraktis tiun ĉi temon en ĝenerala maniero en antaŭe publikigita artikolo: “La problemo de paronimoj en Esperanto” (*Paco*, 1978/3, p. 10–11). Nun mi prezentos por komparo kvar vortojn en kvin lingvoj, tri etnolingvoj kaj du planlingvoj. Iliaj signifoj laŭ PIV

la ordinara marŝo de la japana ekonomio. Ili tute ne raportis pri la ordinara japana vivo, pri tio, kion faras, kaj kiel vivas laboristo ĉi tie. Pri kulturaj aferoj, sur la paĝoj de ordinara gazeto en Germanio, aperis nenio. Do la eŭropanoj estas ne informitaj pri la fono de la nuna japana tre forta ekonomio. Nun almenaŭ oni komencas, sed se oni nun faras tion, oni jam havas la malĝustan situacion, ĉar en Eŭropo jam estas certa timemo pri la japanoj.

Due, estas kompreneble ke eksterlanda ĵurnalisto, kiu venas ĉi tien,

vidas Japanion per la okuloj de eŭropano. Eĉ se li restas longajn jarojn, kaj lernas la japanan lingvon, li ne raportos aŭtentike. Tion povas fari nur enlanda ĵurnalisto indiĝena. Kaj pro tio ĉe *Monato* unu el niaj principoj estas ke el certa lando kutime raportas nur indiĝenoj. Ni havas ĉirkaŭ du cent kunlaborantojn, kiuj sidas ĉie en la mondo, kaj ĉiu raportas en la sama lingvo, sed ĉiam kun la kultura, historia kaj socia fono, kiun li havas kiel indiĝeno. La naciaj ĵurnaloj ne povas fari tion. Tion ni povas fari, ĉar ni havas la Internacian Lingvon.

estas jenaj:

1. substantivo: regiono, karakterizita per preskaŭ absoluta sekeco, tre malabunda kreskajaro kaj tre maldensa loĝantaro da nomadoj
2. verbo: fuĝi el militista servo kun la intenco ne plu reveni al ĝi
3. verbo: prezenti en universitato detalan metodon studaĵon pri scienca, filozofia aŭ literatura temo
4. substantivo: lasta parto de eŭropaj manĝoj, konsistanta el fromaĝo, fruktoj kaj dolĉaĵoj

| angla   | franca    | Esperanto | germana        | Volapuko  |
|---------|-----------|-----------|----------------|-----------|
| desert  | désert    | dezerto   | Wüste          | nekulivöp |
| desert  | désertes  | dizerti   | desertieren    | lövön     |
| dissert | dissertes | diserti   | disser(t)ieren | pükatön   |
| dessert | dessert   | deserto   | Nachtsch,      | bostab    |
|         |           |           | Nachspeise     |           |

En la angla kaj franca lingvoj, n-ro 1, 2 kaj 3 devenas de la sama latina etimo, la verbo *disserere*, “eliri el la propra serio, forlasi”. Ili, do, estas ĝemelaj radikoj, montrantaj diversajn stadiojn de la evoluo de la latina vorto en etnolingvoj. La origino de n-ro 4 estas la franca verbo *desservir*, “prilevi la tablon”. La Esperantaj vortoj kun “s” sekvas la skriban formon de la etnolingvaj vortoj, dum la du vortoj kun “z” estas transskribitaj laŭ la prononco de la etimoj.

Kiu devas lerni la anglan kaj francan vortojn ja havas malfacilaĵojn pri ilia simileco. En la angla, la substantivo *desert* diferencas de la verbo *desert* per ŝanĝo de la akcento de la unua al la dua silabo kaj per ŝanĝo de la “e” en la unua silabo al prononcata “i”. *Dissert* kaj *dessert* ambaŭ havas la akcenton sur la lasta silabo, sed en la unua, *ss* estas “s”, dum en la dua ĝi estas “z”. Similaj kontrastoj troviĝas en la francaj vortoj, kvankam la finaĵo *-er* helpas distingi la infinitivojn. La duobla litero *ss* estas prononcata kiel “s” kaj la litero *s* kiel “z”. Estas evidente, ke lernantoj devas fari grandan cerbostreĉon por lerni, kiel precize skribi kaj prononci ĉiujn kvar paronimojn.

Se ni nun komparas la Esperantajn vortojn, ni trovas, ke apenaŭ estas pli facile lerni la ĝustan ortografion, prononcon kaj signifon de la kvar vortoj. La distingaj elementoj estas la samaj: “s/z” kaj “e/i”. Kiom da esperantistoj, trovante tiujn ĉi vortojn ekster kunteksto, sciis la signifojn. Mi vetas, ke tre malmultaj povus trafe diveni la vorton, se ili legus nur la difinojn.

La problemo estas eĉ pli grava por parolantoj de etnolingvoj, en kiuj la sono literita per la litero “s”, en certaj pozicioj voĉiĝas kaj estas elparolata “z”. (Pri tiu ĉi fenomeno vidu mian artikolon “La “so/zo”-problemo en Esperanto”, aperinta en *The Australian Esperantist*, 1980, n-ro 176 (256), p. 275-276.) Jen

ekzemploj de eraro kaŭzita de tiuj ĉi insidemaj paronimoj. Ambaŭ citaĵoj estis ĉerpitaj el *Lumo* (somero 1980, p. 24).

- a. “Jen en Germanio bone konata dezerto precipe ŝatata dum la varma somero...”  
Ĉu vere? Kiu ŝatas dezertojn dum la varma somero?
- b. “Kaĉigitaj tiuj fruktoj donas guston al la tuta dezerto.”  
Se dezerto havas fruktojn, tio povas rezulti ne de kaĉigado sed de irigaciado!

La atentema leganto tuj ekvidas la eraron: la verkinto de la du frazoj skribis “dezerto” anstataŭ “deserto”.

Nun ni ekzamenas la samajn kvar vortojn en la germana lingvo kaj en Volapuko, la sola internacia planlingvo, kiu atingis sukceson antaŭ Esperanto. En la germana, vortoj 1 kaj 4 estas tute malsamaj, do oni ne povas intermiksi manĝon kun geografia regiono. En n-roj 2 kaj 3 la diferencoj similas al tiuj en la angla kaj franca lingvoj; kontrasto inter la vokaloj “e” kaj “i” kaj konsonantoj “z” (s) kaj “s” (ss). La kvar germanaj vortoj, do, estas iom pli facile lerneblaj ol la respondaj anglaj kaj francaj.

Volapuko prezentas la perfektan solvon: kvar diversaj vortformoj por la kvar signifoj. Intermiksigo ne eblas, ĉar la literado kaj prononco estas maksimume malsamaj. Oni multe kritikas Volapukon pro ĝiaj arbitraj kaj misformitaj — oni nomas ilin kriplitaj — vortformoj, sed oni devas konfesi, ke tiu ĉi kvaropo ne havas la difektojn de vortoj elektitaj surbaze de la naturalismaj principoj de planlingvistiko. Cetere, la volapukaj vortoj estas facile analizeblaj: (1) estas “nekultivita loko”, (2) estas volapukigo de la angla verbo *leave*, “forlasi”, (3) estas volapukigo de la angla verbo *speak*, “paroli” kun la nedetermina konkreta substantiviga sufikso *-at* kaj la infinitiva finaĵo *-ön*; la verbo signifas “fari paroladon, diserti”, (4) la volapuka vorto estas kalkeo de la germana *Nachtsch*, laŭvorte “post-tablo”.

Same kiel en Esperanto, la kvar vortoj en ĉiuj postaj lingvoj de la naturalisma skolo kiel Ido, Occidental, Novial, Neo kaj Interlingua (IALA) tro similas unu al la aliaj. Jen la serio en Novial: 1. *desertu*, 2. *deserte*, 3. *diserta*, 4. *desere*. Imagu, kiel sonus tiu ĉi frazo tradukita en Novial: “Post sia dizerto, li iris al dezerto por diserti pri deserto.” Ĝi estas sufiĉe orelagaca ankaŭ en Esperanto.

Mi havas kajeron plenan de pluraj aliaj ekzemploj de tiu ĉi speco de malfacilaĵo en Esperanto, kiu respondas al paronimaj vortformoj en etnolingvoj. La fakto, ke tri el la vortoj pritraktitaj ĉi-supre estas parencaj kaj devenas de la sama latina etimo, ne estas argumento por konservi tiujn formojn en Esperanto. La ordinara parolanto ne interesiĝas pri la etimologio de la vortoj, kiujn li uzas.

Verŝajne nun estas tro malfrue elimini aŭ ŝanĝi ĉiujn jam ekzistantajn paronimojn en Esperanto, sed oni povas estontece eviti kaj malkuraĝigi la kreadon de pli da tro similaj vortoj. Oni faru tion per la elekto de etimoj el diversaj lingvofontoj. Krome, la etnolingvoj havas abundon da sinonimoj, kiuj estas uzeblaj.



S-ro Baldur Ragnarson, prezidanto de Islanda Esperanto-Asocio kaj vicprezidanto de UEA, vizitis nian Centron en Kameoka la 23an de aprilo. Lin akompanis lia edzino, S-ino Tōrey Kolbeins, kaj ilia filo, s-ro Ragnar Baldursson.

La sekvantan tagon, ili estis invititaj de s-roj Kiotaro Deguchi, prezidanto de Oomoto, kaj Jasumi Hirose, prezidanto de UHA, al nia tegastejo Taiankjo, por ceremonio kaj vespermanĝo. Ili pasigis agrablan tempon, interparolante ĉefe pri la arto-rilata aktiveco de Oomoto. Ŝajnas, ke la tipe kaj stile japana aranĝo de ĝardeno, domo kaj ĉambro multe interesis la gastojn, kaj aparte la subtila lumo de la paperaj lanternoj en la ĝardeno impresis ilin gustoplene.

Foto: la gastoj kaj gastigantoj antaŭ Taiankjo

D-ro Jaime Scolnik (Argentino)

## Infektaj Malsanoj (3)

*Ĉi tio estas daŭrigo de la "Infektaj Malsanoj", al kiu ni erare metis "finon" anstataŭ "(2)" en la antaŭa numero (p. 122). Ni petas pardonon pro tia misaranĝo. — La Red.*

**Kokluŝo** estas infekta kontaĝa malsano, trafanta precipe infanojn 2 ĝis 5 jaraĝajn. Ĝenerale negrava, ĝi povas fariĝi grava ĉe infanoj subnutritaj, loĝantaj en malfavoraj higienaj kondiĉoj aŭ en hospitaloj, aziloj, k. s. Post sensintoma inkubacio aperas la kataro (ĝuste la kontaĝa) periodo apenaŭ distingebla de simpla bronkito, kiu daŭras proksimume 10-15 tagojn. Poste aperas karakteriza tusado konsistanta el intensaj tusoserioj interrompataj de longaj siblaj enspiroj iom similantaj kokokrion. Rimarkindas, ke ĉiu tusoserio apartenas al unusola elspiro; diference de la kokluŝoida (simila al kokluŝa) tusado ĉe bronkopneŭmonio. Kun la vizaĝo kongestita, la lango iom elŝovita, la okuloj protrudaj (elstarantaj) kaj ruĝaj, kaj la vejnaro de la vizaĝo kaj kolo turgeska, la terurita infano atakata de tiu konvulsia tusado kredigas al la ĉirkaŭantoj, ke lia asfiksio estas baldaŭa. Post tiu paroksismo, la fino de la krizo anonciĝas per la sputado de viskozaj mukajoj kaj ofte ankaŭ per vomoj, kiuj, kiam ofte ripetigantaj, povas konduki al subnutriĝo. Tial, kiam la paciento trankviliĝas post la atako, oni devas manĝigi lin iompostio. La

ofteco kaj intenseco de la atakoj tre varias, kaj iufoje la emocio aŭ la kolero provokas ilin. La trafito de kokluŝo, eĉ post konvalesko (kiu okazas 4-6 semajnojn post la komenĉiĝo de la karakteriza tusado), konservas longatempe tendencon al kokluŝa aŭ kokluŝoida tusado, eĉ kun akompano kelkfoje de vomoj kaj naza sangelfluo. La kuracado devas inkludi klimatoterapion, t. e. restadon en klimato de alta montaro (pli ol 1.200 metrojn super la marnivelo) aŭ almenaŭ en la kamparo. Speciala atento devas esti turnata al la ofte perturbita psika stato de la paciento.

**Zostero** estas infekta malsano karakterizita per unuflanka herpetoforma blaza erupcio sur la trajektorio de la sensoraj nervoj kun akompano de ĝeneralaj simptomoj (naŭzoj, vomoj, diareo, sendormeco) kaj febro. Sur la torako la erupcio estas zonforma. Ĝia ĉefa simptomo estas akra neŭralgia (laŭlonge de la nerva irejo) kontinua doloro kun paroksismoj de temp' al tempo, kiu tre suferigas la pacienton, eĉ post la malapero de la erupcio, pleje ĉe maljunuloj. Ĝi atakas prefere adoltojn kaj daŭras ĉ. du semajnojn. Kvankam ties prognozo estas ĝenerale



benigna, ĝi povas fariĝi grava pro komplikajoj aŭ okulaj lokiĝoj, kiuj postlasas kornean maldiafanajon. Malvarmaj kataplasmoj el argilo sur la afekciitan regionon tage kaj nokte estas tre rekomendindaj. Se ial ili ne estas bone tolerataj, anstataŭigu ilin (aŭ alternigu ilin) per varmaj malsekaj fomentadoj, prefere kun dekoktaĵo de kamomilo aŭ fenkolo. Ankaŭ utilas surŝmiri olivoleon aŭ vazelinon.

*Akuta artika reŭmatismo* (reŭmatisma febro) estas infekta malsano, kiu trafas ĝenerale junajn adoltojn (pleje 20-30-jarajn) kun antaŭdispozicio. Oni devas klare distingi ĝin disde artrito, artrozo, reŭmatoida artrito kaj aliaj diversspecaj artikaj afekcioj. Ties prodromoj (antaŭsignoj), kiuj daŭras 8-15 tagojn, konsistas ofte el angino, febro kaj diareo. Poste aperas la artikaj simptomoj: ambaŭflankaj grandaj artikoj de la supraj kaj malsupraj membroj estas pleje trafitaj. La doloro estas akrega kaj la plej eta movo aŭ premo intensigas ĝin. Tial la paciento kuŝas senmove surdorse kaj tenas siajn membrojn duonfleksitaj. La moviĝemo estas karakterizajo de tiu doloro, kiu rapide pasas de unu artikolo al alia kun akompano de ŝvelo, ruĝeco kaj plialtiĝo de la loka temperaturo. La facio de la paciento (la specifa aspekto de ties vizaĝo) estas karakteriza: pala (tiu malsano intense anemias), angora, malvigla; li febras kaj abunde ŝvitas. La krizo daŭras ordinare 10-12 tagojn, sed tiu daŭro tre varias. Recidivoj ne maloftas. La reŭmatisma febro, kiel tekstas konata medicina aforismo, lekas la artikojn kaj mordas

la koron. Tio signifas, ke ĝi ne postlasas artikajn lezojn, sed kaŭzas tre ofte korajn komplikajojn (endokardiiton kaj perikardiiton), sen menci aliajn (cerban, pleŭran, okulan). Kompleta enlita ripozo estas nepre necesa dum la tuta daŭro de la malsano. Apliku malvarmajn kompresojn ofte renovigitajn sur la afekciitajn artikojn kaj ankaŭ sur la antaŭkoran regionon. Se la doloraj artikoj ne toleras la malvarmajn kompresojn nek la malvarmajn kataplasmojn el argilo, surŝprucigu sur ilin malvarman akvon dum 1 aŭ 2 minutoj ĉiuhore aŭ ĉiuduhore. Kiam la febro kaj doloroj malpliĝas, utilas kelkfoje anstataŭigi la malvarmajn aplikojn per varmaj: fomentaĵoj, sinapaj kataplasmoj, sablosako, k. s.

*Poliomjelito* (infana paralizo) estas grava infekta malsano, karakterizita per inflamo de la griza substanco de mjelo. Ĝi trafas pleje infanojn 4-9-jarajn; sed ĉiuj infanoj de 1 ĝis 16 jaraj (virseksaj pli ofte ol ineseksaj) estas ricevemaj. Junuloj pliaĝaj kaj eĉ adoltoj povas ankaŭ esti trafitaj. Post inkubacio daŭranta 7-14 tagojn aperas 2 ĝis 4-taga prodroma periodo, karakterizita ĝenerale per nealta febro, kapdoloro, senapetiteco, vomoj, gorĝa doloro kaj dormemo; en aliaj kazoj, korizo, tusado aŭ diareo. Diagnozo dum tiu ĉi frua periodo estus tre grava, sed ordinare malfacila, ĉar tiuj simptomoj estas komunaj al multaj aliaj infektaj malsanoj. Aperas poste gravaj simptomoj: intensaj kap- kaj muskoldoloroj, alta febro (malofte pli ol 39° 5 C), vomoj, nuka kaj spina rigideco, antaŭtimo. La rigideco de la nuko

kaj spino kaj la muskoldoloroj, kiuj karakterizas tiun ĉi periodon, ŝuldiĝas al muskolaj spasmoj. Kiam la centra nerva sistemo estas jam afekciita, la paciento ne volas, ke oni tuŝu aŭ movu lin; li pene sidiĝas kun la trunko klinita malantaŭen, sin apogante en tiu pozicio sur la brakoj etenditaj ankaŭ malantaŭen. Li ne povas aktive fleksi la kolon; kaj, en sida pozicio, li ne povas fleksi la trunkon sur la femuron, se li ne fleksas samtempe la gambojn. Mallakso oftas, samkiel ne daŭra paralizo de la urinveziko. Multaj kazoj de poliomjelito alprenas la paralizan formon ekde la tria tago de la stata periodo. Ĝi trafas unu aŭ plurajn muskolajn grupojn, kiuj prezentas diversgradajn parezojn aŭ paralizojn. La muskoloj de la gamboj estas plejofte afekciitaj. Grava danĝero de asfiksio minacas la pacienton, kies voĉo tre mallaŭtiĝas, kiam la spiraj muskoloj estas trafitaj.

La kuracado konsistas en la plej strikta observado kaj plenumado de la ĝeneralaj indikoj por la infektaj malsanoj. La paciento devas kuŝi sur firma matraco metita sur tabuloj, por eviti sinkadon. Evitu ankaŭ iamaniere, ke la littuko kaj kovrilo sin apogu sur la piedfingroj. Por faciligi la malstreĉiĝon de la spasmaj muskoloj, la kuracisto devas laŭkaze ŝanĝi lian pozicion kaj/aŭ uzi alcelan kusenon. Kiam la muskoldoloroj aperas, apliku sur tiun regionon kaj ankaŭ sur la tutan spinon varmajn fomentaĵojn ofte renovigitajn dum la tuta tago, kaj tuj kovru ilin per lana ŝtofo por konservi la varmon; ankaŭ utilas la alternaj kompresoj

varmaj-malvarmaj. Ŝvitiga envolvo povas esti necesa kelkfoje por ŝvitigi la pacienton. Kiam la parezoj aŭ paralizoj aperas, la kinezoterapio ludas tre gravan rolon. Oni komencas per pasivaj movoj; poste masaĝoj kaj reedukaj ekzercoj, kondiĉe, ke la paciento ne sentu doloron. Tiu ĉi devas, kiel eble plej ofte, ŝanĝi sian dekubiton por preventi kuŝeskarojn. Oni sin turnas al la oksigenterapio kaj eventuale eĉ al ŝtalpulmo (spirkasono), kiam aperas la unuaj simptomoj de asfiksio.

*Erizipelo* estas infekta malsano karakterizita per inflamo de la (plej ofte vizaĝa) haŭto. Tiu ĉi prezentiĝas sub formo de elaste malmola ruĝa plato, kies reliefa rando klare elstaras de sur la ĉirkaŭanta sana haŭto. Ĝi daŭras ordinare 8-10 tagojn kaj la prognozo estas benigna. La kontaĝo okazas, ne tra la aero kiel ĉe la erupciaj malsanoj, sed per la manoj, tolaĵoj aŭ instrumentoj. Skrupulaj higienaj antaŭzorgoj estas do necesaj por eviti ĝin. Malvarmaj kataplasmoj el argilo aŭ kaolino (aŭ malvarmaj kompresoj ofte renovigitaj) sur la lezon, tage kaj nokte, estas tre rekomendindaj.

*Difterio* estas toksinfekta kontaĝa malsano, kiu trafas pleje infanojn 2-7-jarajn. Ĝi okazigas ĝenerale angino; sed povas ankaŭ invadi la laringon kaj eĉ la traheon. Sur tiuj mukozoj formiĝas brilblankaj falsaj membranoj, kiuj forte alteniĝas al ili, povas ŝtopi la spirajn vojojn kaj mortigi per asfiksio (krupo aŭ pseŭdomembrana laringito). Krome la difteria toksino kontribuas al senforteco de la paciento kaj kapablas kaŭzi gravajn lezojn de la

nervaj centroj, miokardio, renoj kaj surrenaj glandoj. Kiam la malsano prezentigas sub tiu maligna formo, ĉefe pro elĉerpiĝo de la natura viviga energio, la prognozo estas ofte morta. La kuracado devas inkludi malvarmajn kataplasmojn el argilo aŭ kaolino (aŭ malvarmajn kompresojn) sur la kolon, tage kaj nokte, kaj oftajn gargarojn

per citron- aŭ ananasosuko, kaj travojn de la nazo per oksigena akvo je 10 volumenoj miksita samproporcie kun komuna akvo aŭ per dekoktaĵo de kamomilo aŭ malvo aŭ ekvizeto aŭ per sala akvo. Por eviti komplikajojn, la paciento devas enlite ripozi eĉ dum la tuta konvalesko.

(daŭrigota)

## ENHAVO

- \* La Unua Konferenco de Aziaj Delegitoj de UHA 3
- \* M. Tanaka : Oomoto inaŭguris monumenton en mikronezia insulo Ponapo 12
- \* Intervjuo kun la Dekano de Canterbury-Katedralo (trad. K. Aojagi) 15
- \* William Gilkey : La Historio de Oomoto (trad. T. Nakamura) 32
- \* Elizabeth Oliver : Revivigi la Teron (trad. C. Rowe) 39
- \* Intervjuo kun s-ro Stefan Maul 46
- \* T. Agou : Japana Manlingva Vortaro de Surdmutuloj aperis 49
- \* Edwin de Kock : Karmemore/Pluenemo (poemoj) 53
- \* Bernard Golden : Deserto en la Dezerto 55
- \* Ges-roj Baldur Ragnarsson kun sia filo ĉe Oomoto (foto) 58
- \* D-ro Jaime Scolnik : Infektaj Malsanoj (3) 59

## FOTOKLARIGOJ

(*Dekstra paĝo*) S-ro V. R. K. Aiyer, delegito de UHA el Madraso, Hindujo, ĉe la mikrofono en la Internacia Konferenc-Halo de Kioto

(*Malsupre*) S-ro Charles Rowe (anglo), nia kunredaktoro, kaj f-ino Naojo Uemura geedziĝis antaŭ Dio en la Mirokuden-sanktejo, Ajabe, la 27an de novembro, 1980.

(*Dorsa paĝo*) Sakuro floranta en la ĝardeno de Oomoto, Kameoka



